

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

116-a jaro • n-ro 1380 (6) | junio 2023

**Harmonia (post)kongreso en
Israelo kaj Jordanio | 123**

**La Interlingvistikaj Studoj de AMU
25-jariĝas | 128**

**Kvar grandaj strategiaj temoj – niaj
defioj | 133**

**Vikipedian laboron subtenis
Erasmus+ | 138**



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon, la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Generala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):
1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas minimume €20,00). Menu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
tel.: +31-10-436-1044
uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



123

Harmonia (post)kongreso en Israelo kaj Jordanio

Krom fotoj, du objektoj plej memorinde akompanis la kongreson: unu estis la verda flago. La dua estis la gitaro, per kiu koncertis ĉiuj artistoj.



128

La Interlingvistikaj Studoj de AMU 25-jariĝas

La Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU) en Poznano (Pollando) ofertas ekde 1998 internaciajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko en Esperanto.



133

Kvar grandaj strategiaj temoj – niaj defioj

Preparo por diskutado dum la Universala Kongreso en Torino
Proksimiĝas la enketilo pri niaj prioritatoj, do bonvolu tion atenti, plenigi kaj resendi post ĝia alveno.



138

Wikipedian laboron subtenis Erasmus+

Wikipedio kaj ĝiaj frataj projektoj apartenas al la plej videblaj sukcesoj de la Esperanta komunumo. La Esperanta Wikipedio kun siaj preskaŭ 350 000 artikoloj estas pli granda ol multaj Vikipedioj en etnaj lingvoj.

Eventoj | 124
Buntaj tagoj sub la verda flago

Laste Aperis | 127

Recenzo | 130
Enprofundigilo pri niaj kulturaj tradicioj

Historio | 131
Rogov (El "Forgesitaj nomoj")

Afriko brilas | 136
Esperanto-kurso apud la nacia parko Serengeti

Eventoj | 137
La 39-a Printempa Semajno Internacia 03 – 10 aprilo 2023

Bonvenigu Esperanto-libron hejmen | 139

Oficiala Informilo

Intervjuo | 140
Interparolo kun Petro Chrdle

Fake, Science kaj Profesie tra la mondo | 142
James Webb malkovris akvosignojn en terca ekster-planedo, subtenante la studon de Wandel pri la potencialo malkovri vivon en aliaj sunsistemoj

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Duncan Charters (Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsie, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel (Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar (Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75015 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute (Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândușei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timișoara, Rumanio
Poŝtel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo (Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva (Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu (Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsom Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Albert Stalin Tancinco Garrido kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>



Harmonia (post)kongreso en Israelo kaj Jordanio

■ Amri Wandel

La Israelan Kongreson (IK) kaj la kongresajn ekskursojn mi organizas kaj ĉiĉeronas jam pli ol dudek jarojn. Tiu amromano komenciĝis en 2000, dum la 85-a UK en Tel-Avivo kiel prezidanto de la LKK kaj interpretisto de la plurtaga postkongresa ekskurso tra Jordanio. La sekvan jaron israelaj esperantistoj komencis organizi tutlandajn E-semajnfinojn kaj mi respondecis pri la programo kaj ekskursoj kaj ofte ankaŭ pri la kongresejo, eksterlandaj gastoj kaj buĝeto. Preskaŭ dekomence mi klopodis inviti konatajn eksterlandajn artistojn – Kajto, Jomo, Edgar kaj Bronŝtejn jam koncertis plurfoje, ankaŭ Ĵomart kaj Nataŝa (en 2018) kaj lastjare Handzlik kaj Pilipoviĉ. Alia nekutima kunlaboranto aperis por la postkongresa ekskurso en Jordanio. Saleem Zalahiah, la posedanto de beduena kampadejo en Wadi Rum, jam de jaroj prezentas al la esperantistaj gastoj ne nur beduenstilan manĝon kaj tendumejon, sed ankaŭ surprizan konon de kelkaj frazoj en Esperanto.

Kelkaj mejloŝtonoj de la IK: 2008 – pro konsilo de Renato Corsetti ni ŝanĝis la nomon de la evento de KIES (Komuna Israela E-Semajnfino) al IK.

En 2013 la IK okazis kiel la 7-a Azia Kongreso en Jerusalemo. En 2019 la jubilea 20-a IK okazis dum kvin tagoj kiel la Mezorianta Kunveno (paralele kun Irano) en Eilat kaj Akaba. En 2020 aliĝis rekorda nombro de eksterlandanoj, sed la pandemio haltigis ĉion dum pli ol du jaroj.

Tial ĉi-jare mi des pli ĝojis pro la aliĝo de pluraj el la tiamaj aliĝintoj kaj aldone pliaj proksimaj geamikoj. Preskaŭ ĉiuj 13 eksterlandaj kongresanoj ankaŭ partoprenis en la jam tradicia postkongresa ekskurso tra Israelo kaj Jordanio, tiel ĝi fariĝis la dua aŭ tria plej granda Postkongreso (post tiuj de la Azia Kongreso en 2013 kaj de la jubilea Kongreso en 2019). La ĉi-jara postkongresa grupo fariĝis plej harmonia kaj unika teamo. Jam dum la tritaga kongreso aperis speciala amika etoso, kiu plu kreskis dum la ses intensaj, foje streĉaj sed sperto-plenaj tagoj de la postkongreso.

Spontanee estiĝis WhatsApp-grupo nomata “Postpostpost...kongreso”, por interŝanĝi fotojn, memoraĵojn, spertojn pri la plua restado en Israelo kaj la hejmvoyaĝo.

Pluraj postkongresanoj deziris dividi siajn spertojn kun la legantoj de *Esperanto*. Skribis Eŭheno el Ukrainio:

“Ne volas mi nomi ĝin postkongreso aŭ postpostkongreso ĉar la 13-an de aprilo 2023 komenciĝis mia Israela Esperanto-kongreso kaj ĝi daŭros ĝis la fino de la vivo. Pro tio ke mi por ĉiam ekamis Israelon kaj miajn gekunkongresanojn. Ne gravas ĉu ni kunos fizike aŭ per Zoom... Ŝajnas ke la IK okazis kune kun la infana kongreseto, ĉar tiuj du ĉarmaj infanoj ĝuis same kiel seriozaj adoltoj la miraklan pupoivon en la magiaj manoj de la majstro Kristofo... La postkongresa vojaĝo okazis brile de ĉiuj vidpunktoj. Belega nekutima



naturu, interesaj historiaĵoj, grupa komuna etoso de amikeco kaj subteno, saĝa tolerema gvidado, diversspecaj aventuroj faris ĉi postkongreson unu el la plej impresaj ankaŭ kompare kun UEA-postkongresoj.

El alia vidpunkto priskribis la postkongreson Christoph Frank el Germanio:

“Se oni min demandus: kio plej plaĉis, mi ne havus tujan respondon: mi la unuan fojon naĝis kaj en la Morta kaj en la Ruĝa Maro (kaj tie observis belegajn diversajn fiŝojn ĉirkaŭantajn koralojn), tranoktis en beduena tendo kaj admiris la multkolorajn rokojn de Wadi Rum, vizitis la sagacajn ejon Petra kun impona miksaĵo de diverskoloraj rokoj kaj montoj kun antaŭ miloj da jaroj home faritaj tombejoj... Ĉu mi jam menciis, ke mi sidas en aviadilo hejmen flugante? Ju pli for de Israelo mi estas, des pli forte mi sentas la neĉeston de la ĉarma grupo, kun kiu mi havis tiom da ĝuo...”

Unu semajnon post la reveno preskaŭ ĉiuj grupanoj renkontiĝis virtuale dum la hibrida kunveno de la Tel-Aviva klubo, por spekti fotojn kaj rakonti spertojn de la kongreso kaj Postkongreso (<https://eventaservo.org/e/38d44e>). Ĝi estis tiom sukcesa, ke oni tuj decidis okazigi pliajn virtualajn kunvenojn.

Pejzaĝojn oni pli facile priskribas per bildoj ol amikan etoson, sed estis pluraj specialaj momentoj, kiel la tradi-



cia ferma forumo de la kongreso kaj la posta amika rondo kaj spontanea postkongresa adiaŭa forumo en Jerusalemo kun personaj memor-tasoj donacitaj de Israela s-anino. Multaj pliaj specialaj fotoj videblas en Vizaĝlibro, ekzemple pri la kongreso en <https://mallonge.net/z9>. Kaj de la postkongreso en Jordanio en <https://mallonge.net/za>.

Krom fotoj, du objektoj plej memorinde akompanis la kongreson: unu estis la verda flago, pri kiu skribis Christoph: “Por ne perdiĝi, nia grupo kunhavis Esperantan flagon, kiu ne nur estis bone videbla de fora loko, sed

ankaŭ vekis scivolemon de sufiĉe multaj preterirantoj. Kelkaj eĉ alparolis nin esperantlingve.” La dua estis la gitaro, per kiu koncertis ĉiuj artistoj: Bronŝtejn, Nataŝa, Lineckij kaj Christoph (eĉ dum la postkongresa busvojaĝo de Tiberiado laŭ la Jordanvalo al la Morta Maro!). Fakte temas pri historia gitaro, kiun mia patrino en 1939 kunportis fuĝante de la nazia Germanio al Palestino. En la milito de 1948 ĝi estis damaĝita de bombado sur Tel-Avivo. En 1975 mi kunportis la gitaron al la IJK en Danio, kaj nun ĝin uzas mia filino por Eŭritmio.



Buntaj tagoj sub la verda flago (23-a Israela Kongreso de Esperanto)

■ Graĝina Opulskienė

Kiam ni planas kiun Esperantan eventon partopreni, certe ni havas kelkajn kriteriojn: kie, kiam, kiu organizas, kia programo, kiuj aliĝos, kiaj ekkursoj, kia prezo ktp.

La 23-a Israela kongreso invitis nin al la malnova urbo Tiberiado, kiu situas ĉe la fama lago de Galileo. Evidentiĝis, ke nia hotelo Panorama estas tuj apud la lago, kiun la lokanoj nomas Galilea maro, kaj kiu estas vere belega! Eĉ se la kongresa hotelo ne estis la plej

luksa, ĝi plene taŭgis por kongresi: salono por prelegoj kaj kulturaj programoj, ebleco matene krei la matenmanĝon laŭ inspiro kaj produktoj provizitaj en la kuirejo, apudaj lokoj por vespermanĝoj kaj kun samĉambroj estis vere proksima kontakto

pro la grandeco de la ĉambroj. Mi bonŝancis loĝi kun juna, ĉarma kaj tre laborema loka knabino, Inbar Mor. Mi aŭdis, ke judoj ĝenerale estas tre lernemaj, sed Inbar tamen surprizis min: ŝi praktikis Esperanton notante ĉiunovan vorton kaj pluse lernis la hispanan lingvon, dancojn kaj aliajn aferojn dum ĉiu libera minuto!

La kongreso okazis 13-15 aprilo, postkongreso 16-21, sed ĉio estis tiom plena kaj varia, ke ŝajnis al ni, ke estas multe pli longa kunestado. Amri Wandel kaj kelkaj helpantoj estas jam ege spertaj organizantoj de tiaj kongresoj kaj tion ni sentis dum la kongreso kaj speciale dum la postkongreso. Ĉiam trankvila, bonhumora, fleksebla, rapide adaptiĝanta al deziroj kaj ebloj de la partoprenantoj, sperta pri etaj trukoj kiel ŝpari monon, Amri vere estis por ni ne nur gvidanto kun verda Esperanta flago, sed ankaŭ la modelo de ĉiĉeronado!

La kongreson ĉeestis pli ol tridek homoj, el kiuj 13 estis de eksterlando. Por mi persone estis tre agrable revidi la lokajn jam konatajn esperantistojn Amri kaj Gila Wandel, Mikaelon

Lineckij, ekkoni Nava Bilicki, paroleti kun Angela Belenko, aŭdi la modelan Esperanton kaj interesajn faktojn de Jehoŝua Tilleman. Bele gajigis la kongreson kaj junigis kvinopo de la familio Yuval. Partoprenis ankaŭ Ŝulamit Cemaĥ-Tendler, kiu estas komencanta esperantistino kaj surprizis nin per donacoj: multaj el ni ricevis de ŝi donace lernolibron pri la hebrea lingvo kaj fine de la postkongreso Ŝulamit enmanigis al ni tasojn kun foto de ĉiu partoprenanto!

Eksterlandaj esperantistoj reprezentis plurajn landojn: Germanion, Ukrainion, Svedion, Hispanion, Rusion kaj Litovion, sed ni povus menciigi ankaŭ Brazilon pro Ana Ribeiro, kiu same kiel la litovino Rasa Miŝeikytė nun loĝas en Germanio. Mi ĝojis, ke krom Rasa kaj mi en la kongreso kaj postkongreso estas ankaŭ Laima Vilkelytė, kaj mi iom fieras, ke ni estis triopo kiu ne krokodilis, eĉ se ni solaj loĝis en la ĉambro. Cetere, la lingva nivelo de la kongresanoj estis alta kaj dum la postkongreso eĉ tre alta.

Mi ege ŝatis la iom ne kutiman por kongresoj formaton: ni ekskursis matene, posttagmeze kaj vespere estis la prelegoj kaj kultura programo. Se vin interesas kio okazis, kontrolu en <https://www.esperanto.org.il/ik23.html>, sed la programo estis tiom abunda, ke ofte la prelegantoj devis pli kurte prezenti sian prelegon. Jam dum multaj israelaj kongresoj per la unua violono ludas Mikaelo Bronŝtejn kaj ĉi-jare li, feliĉe, povis partopreni fizike. Mikaelo gvidis nin poezie kaj literature kaj tra siaj literaturaj spertoj kaj tra juddevenaj poetoj en la rusa kulturo kaj, kompreneble, koncertis. Amri atentokapte informis nin pri la serĉoj de ekstertera vivo, Heide Martha Otto prezentis la ekeston kaj agadon de Bahaa E-ligo, kiu jam atingis la 50-jaran jubileon. Okazis ankaŭ la kortuŝa memorhorro pri la elstara esperantisto Jefim Zajdman kun multaj fotoj prizorgitaj kaj montrataj de lia edzino Anĝela. Kantojn kaj rememorojn pri la soveta-ukrainia-israela aktivulo Zajdman prezentis Mikaelo Lineckij kun helpo de Mikaelo Bronŝtejn, Natalia Bertse kaj Tatiana Kolomic. Specialan intereson kaj multajn demandojn elvokis la prelego de Eŭheno Kovtonjuk,



kui atestis pri la milito en Ukrainio, ĉar li venis al la kongreso de Kievo kaj tio, kio okazas nun en Ukrainio, estas liaj personaj spertoj kaj scioj.

Ankaŭ la kultura programo estis alloga kaj tie la stelo de la kongreso estis la fama en Esperantujo pupteatristo kaj magiisto Christoph Frank. Li el Germanio alvenis kun valizego en kiun eniris elefantoj, leono kiu surgrimpas la propran voston, Hugo, kiu ĉiam preta helpi, miraklaj aĵoj por magio, eĉ la tuta scenejo por la pupteatraj prezentoj. Parton de la scenejo Christoph devis malmunti, ĉar la avia kompanio ne permesis kunporti magnetojn, sed la spektaloj tamen estis kiel magnetoj por altiri nian atenton. Speciale ilin ĝuis tri infanoj de la familio Yuval, sed ankaŭ la plenkreskuloj admiris la magion kaj aktoradon de Christoph.

Koncertoj ne mankis dum la kongreso. Krom koncertoj de Mikaelo Bronŝtejn, kiu venis de Rusio, belaj kantoj de Natalia Bertse el Svedio, kortuŝa koncerto de la ukrainoj Mikaleo Lineckij kaj Tatjana Kolomic kun Natalia, ni aŭskultis ankaŭ la lokan kantistinon Enrica Arbib.

Kongresaj ekskursoj gvidis nin laŭ la spuroj de Jesuo kaj tiuj abundas apud la lago de Galileo. Lokoj kaj eventoj kiujn mi aŭdis kaj sciis de la Biblio, de diversaj tekstoj kaj citaĵoj, dank' al la ekskursoj iĝis tre konkretaj imagoj: Nazareto, Kapernaumo, urbeto kie akvo iĝis vino, vilaĝo kie loĝis Maria Mag-





dalena, la loko kie okazis la miraklo pri fiŝoj kaj pano, kaj multaj aliaj mencioj en bibliaj rakontoj nun estas ligitaj kun konkretaj impresoj. Dum postkongresa ekskurso tiuj bildoj estis ankoraŭ pli kompletigitaj. Vere tiuj ekskursoj estas por mi inspiro relegi la Novan Testamenton jam kun alia imago kaj sento.

Tuj post la kongreso la eksterlandanoj, gvidataj de Amri, havis belan daŭrigon: vojaĝon tra multaj interese-gaj lokoj de Israelo kaj eĉ du tagojn en Jordanio. Mi kredas, ke en la memoro de ĉiuj 10 partoprenintoj (unuan tagon ni estis 11) estas ĉizitaj rememoroj pri la etoso, viditaj lokoj, diversaj temperaturoj, modela gvidado kaj ĉarmaj aventuroj. Nur vidu pri kiaj lokoj temas: mallonga halto en kibuco kiu kultivas daktilojn, veturo tra la Jordana Valo al la Morta Maro kaj neforgesebla banado tie, vizito en Jeriko (Hiŝam-palaco), plantoj, bestoj kaj akvofalo en Ein-Gedi, impona heroo historia en la fortikaĵo de Masada, kiun ni atingis per telfero, submara observejo kaj naĝado ĉe la Ruĝa maro en Eilat, antikvaj Jeruzalemo kaj Jafo – ĉio tio kaj multaj survojaj momentoj gravuras en niaj koroj kaj kapoj Israelon kiel landon kun riĉa historio, nekredible laboremaj homoj kaj strebo krei prosperan ŝtaton.

Aparte mi devas mencii nian dutagan viziton al Jordanio, ĉar viziti Petra mi revis minimume 40 jarojn kaj finfine tiu revo efektiviĝis! Mirinda loko, mirinda sento! Ankaŭ defio fari ĉirkaŭ 20 km dum unu tago sub la suno, kiam granda parto de la vojo estas tra la ŝtuparo supren-malsupren, ne malalta prezo de la vizito... sed vere valoris efektiviĝi tiun revon! Amuza fakto estas, ke en nia grupo estis la germana paro Hariolf Traub kaj Petra Sedlmeier kaj sian nomon Petra ŝuldas al la ruĝkolora, im-

pona Petra de la nabatea popolo. Ŝia patro iam estis tiel impresita de vizito ke li nomis la filinon Petra. Nepre vizitinda angulo de nia bunta planedo kaj des pli vizitinda kun verda Esperanto-flago, ĉar kaj en Petra kaj en aliaj lokoj ofte homoj interesiĝis kiun lingvon ni parolas kaj kiun landon ni reprezentas. Mi neniam estis en Esperanta aranĝo kie flago tiom fidele estis portata ĉiam kaj ĉien, eĉ dum nokta promeno en Jeruzalemo ni kvinope portis la flagon kaj devis klarigi al junuloj, kiujn ni renkontis kio estas Esperanto.

Kaj la ĉerizo sur la torto, kompreneble, estis la vizito al la valo Wadi Rum! Dum multaj jaroj mi legis la raportojn de Israelaj Kongresoj kaj postkongresoj, vidis multajn fotojn de esperantistoj sur rokoj kaj kameloj, do mi kvazaŭ jam imagis kiom interesa loko estas tiu valo, sed... ne eblas vere imagi sen vizito tra tiu mirinda mondo: koloroj, pejzaĝoj, etoso, veturo per ĵipoj kun vento tra dezerto, silento matene, ĉielo nokte, manĝo elfosita el forno en la tero, muziko vespere, afabla rideto de beduenoj kaj eĉ kelkaj Esperanto-frazoj de la posedanto de nia kampadejo Salim – ĉio tio ŝajnis tro bela kaj tro ĉarma por vere esti realo. La loko estas absolute mirakla kaj tion pruvis eĉ vera fakto: nia kara fotisto Eugeno, kiu ĉiam kapablis trakuri kaj tragrimpi multoble pli ol ni, glitante sur la dorso de altega duno, perdis sian telefonon. Imagu kiom malfeliĉaj ni ĉiuj estis, ĉar li fotis multege kaj de interesaj anguloj, ofte de supre... Tamen Christoph eble iom magiis, Eugeno multe bonŝancis kaj ili retrovis rapide la aparateton en la sabla dunego! Kia ĝojo por ĉiuj! Mi vere suspektas, ke nia magiisto Christoph kapablas pli ol li demonstros dum la spektakloj, ĉar en la hotelo en Eilat, li kvazaŭ hazarde sugestis al ni uzi la liberan minuton por registri la gratulmesaĝon por la naskiĝtago de lia edzino, kaj la rezulto estis, ke la administrantino de la hotelo, impresita de nia komuna kantado, oferis picojn kaj ĉampanon por la vespermanĝo!

Amuzaj kaj ne kutimaj momentoj estis kelkfoje dum la postkongreso: bano en la Morta Maro por ni ĉiuj lasis impreson, sed kelkaj eĉ iris tien baniĝi ankaŭ nokte. Aventura estis grimpa-

do nudpiede sur la rokoj de Wadi Rum, bele estis kuri man-en-mane de la duno. Speciale interese tamen estis kiam en Jeruzalemo, ĉe la tombo de Davido, virinoj aŭdis ekscitajn voĉojn ĉe la vira flanko kaj niaj viroj ne rapidis reaperi. Kiam ili venis, ni vidis, ke Paulo Meliz de Hispanio, estas ornamenta kiel judo per speciala skatoleteto sur la kapo, rimeno volvita ĉirkaŭ la brako kaj ĝojplena juda helpanto de rabeno preskaŭ dancis ĉirkaŭ li pro la ekscito. Helpanto de rabeno pro la aspekto de Paulo suspektis lin esti judo kaj vere la patrino kaj avino de Paulo estis juddevenaj, do la rabeno permesis specialan ceremonion, kiu bonvenigis Paulon reen al la juda popolo. Li mem ridas, ke li restis la sama Paulo, kia li eniris, kaj ke por vere iĝi judo estas multe pli longa kaj komplika vojo!

Antaŭ mia foriro al la kongreso multaj amikoj, konatoj kaj familianoj, eĉ la ministerio de eksterlandaj aferoj provis konvinki min, ke ne valoras iri al Israelo pro ebلا danĝero. Mi ja plene fidis, ke Amri scias kien kaj kiam iri kaj mi ne eraris: eĉ ne unu sekundon mi eksentis iun danĝeron aŭ minacon. Vidi multajn junajn soldatojn kun armiloj kaj policon en lokoj, kie amasiĝis homoj, estis trankviliga sento, ke ni estas sekuraj. Vere la proverbo, ke timo havas grandajn okulojn, estas vero, kaj se iuj pripensas iri al Israela Kongreso estontece, forgesu la timon. Ha jes... la prezo! Ne malalta se enkalkuli ĉion, sed konsiderante kiom ni vidis, kiom komforte ni vojaĝis per luitaj aŭtoj kaj taksioj, kiel ni ĝuis kunestadon – neniun el ni bedaŭras la decidon veni kaj sperti tiun interesan kaj vere diverskoloran landon, iom ekkoni Jordanion kaj akiri novajn karajn amikojn en Esperantujo!

Dankon al ĉiuj kaj speciale al nia ĉefmotoro Amri!



Laste Aperis

Arboj kaj arbedoj (Pinophyta kaj Magnoliopsida). Oldřich Arnošt Fischer. Brno: MSD, 2022. 54p. 21cm. ISBN 9788073923938. Bela, eĉ se konciza, prezento de sepdeko da arboj. Kun abundo da profesie faritaj koloraj fotoj. € 7,50

Aspazio. Tragedio en kvin aktoj. Aleksander Svjentoĥovski. El la pola trad. L. Zamenhof. Chapecó: Fonto, 2023. 226p. 20cm. Tragedio inspirita de la vivo de greka hetajro devena el Mileto. € 21,00

Bela Joe. Marshall Saunders. Preparis Wally du Temple. En Esperanton trad. J. Blaikie kaj N. Hohlov. Altona: FriesenPress, 2022 (2-a eld.). 226p. 23cm. Ilus. ISBN 97810349106789. Furora "membiografio" de reale ekzistinta hundo. Kor-tuŝa rakonto. € 18,00

Beletra Almanako 45 (Oktobero 2022). Red. P. Daŝgupto, I. Ertl, J.L. Jacobsen, S. Moinhos, N. Ruggiero, A. Stecay. Novjorko: Mondial, 2022. 159p. 22cm. Ilus. ISBN/ISSN 9781595694485/19373325. Prozo kaj poezio (originalaj kaj tradukitaj), artikoloj, eseoj, recenzoj. € 11,10

Bluaj neĝoj. Piotr Bednarski. En Esperanton trad. E. Grochowska. Dobříchovice: KAVA-PECH, 2023. 119p. 20cm. ISBN 9788088326380. Romaneto inspirita de la jaroj pasigitaj, kiel infano, en la siberia gulago. La libro ne rajtis aperi sub la komunisma reĝimo. € 10,50

Dialogo inter la Dioj. El la greka trad. G. Berveling. Chapecó: Fonto, 2022. 79p. 20cm. 25 dialogoj inter diversaj grekaj dioj. € 7,50

Falaflo en maco. Sten Johansson. Novjorko: Mondial, 2023. 177p. 22cm. ISBN 9781595694461. Originala romano kun tikla temo: rilatoj inter jud- kaj arabdevenaj civitanoj en Svedio. € 16,50

Galopu, ĉevaleto! / Bjagaj konĉel! Historioj kun vostaj herooj / Istoriis opaŝati geroi. Elena Popova. Dobriĉ: Matador 74, 2023. 130p. 21cm. Kolorilus. Dulingva: E, bulgara. ISBN 9789543717385. Rakontetoj kaj versaĵetoj taŭgaj por infanoj kaj komencantoj. € 14,10

Georgo Furest', ja I' SulFUR-ESTulo. Serĝo Sir'. Thaumiers: La KancerKliniko, 2022. 28p. 30cm. Suplemento al *La Kancerkliniko*. Adaptaj, precipe poeziaj, laŭ verkoj de la franca aŭtoro Georges Furest, akompanataj de bildstrieaj desegnoj. € 6,60

Ifigenio en Taŭrido. Dramo en kvin aktoj. J.W. von Goethe. El la germana trad. L.L. Zamenhof. Chapecó: Fonto, 2023. 117p. 20cm. Reverko de malnova greka tragedio. € 11,10

Jarsezonoj kaj festotagoj per okuloj de bestoj. Eva Buttová. En Esperanton trad. P. Petřík. Dobříchovice: KAVA-PECH, 2023. 56p. 24cm. Kolorilus. ISBN

9788088326397. Porinfanaj rakontoj kun forta kristana fono. € 8,70


Kanada verkaro, La. Red. W. du Temple. Diversaj aŭtoroj kaj tradukintoj. Altona: FriesenPress, 2023 (rev. eld.). 441p. 24cm. Bind. Kromkovrilo. ISBN 9781039146150. Prozo, poezio, eseoj el diversaj epokoj. € 39,00

Kun sopira koro. Gustavo Adolfo Bécquer. El la hispana trad. F. de Diego. Chapecó: Fonto, 2022 (2-a eld.). 107p. 20cm. Ĉi tiu poemaro estas konsiderata la fundamento de la moderna hispana poezio. € 10,50

Pensoj pri la Esenco. Tetjana Lohvinovska. En Esperanton trad. O.A. Fischer. Brno: MSD, 2023. 80p. 21cm. Kolorilus. ISBN 9788073924034. Filozofiecaj rakontoj akompanataj de belaj koloraj fotoj faritaj de la tradukinto. € 12,00

Plena Vortaro Germana-Esperanto en tri volumoj / Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto in drei Bänden. Erich-Dieter Krause. Novjorko: Mondial, 2023. XII+2511p. 26cm. 3 vol.; bind. Kun pli ol 250 000 leksikaj unuoj, tiu ĉi estas la plej ampleksa nacilingva-Esperanta vortaro. € 266,40

Sinjorino en ruĝo sur griza fono. Miguel Delibes. El la hispana trad. A. Valén. Novjorko: Mondial, 2023. 90p. 21cm. ISBN 9781595694478. "... belega am-historio kun ne pokaj membiografiaj elementoj." € 12,60



La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldona valoro imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 15% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Por adresoj en EU aldoniĝas AVI (9%) ankaŭ por la sendokostoj. Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.

La Interlingvistikaj Studoj de AMU 25-jariĝas

Ilona Koutny,
gvidanto de
la Interlingvistikaj Studoj

La Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU) en Poznano (Pollando) ofertas ekde 1998 internaciajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko en Esperanto. La 3-jaraj studoj estas riĉenhavaj, ja ne ekzistas bazaj studoj pri esperantologio kaj interlingvistiko; interesiĝantoj kun iu ajn baza universitata diplomo povas partopreni ilin.



Interkulturaj komparoj en praktiko

Necesis veturi ĉiusemestre al Poznano por unu intensa semajno, intertempe memstare labori kaj pretigi eseojn, fine ekzameniĝi. Por la nuna, 8-a grupo, nur la septembra sesio estas surloka,

sed okazas pluraj retaj sesioj dum la studjaro ebligante gastpreleĝojn kaj studentajn kontribuojn.

La specialiĝoj en la 3-a jaro de la studoj fokusiĝas al profesiigo pri Esperanto-instruado, internacia interkultura komunikado aŭ pri diversaj terenoj de esperantologio, kiujn fermas defendo de la diplomlaboraĵoj. Eblas ankaŭ daŭrigi: doktoriĝi pri interlingvistika temo.

Dum la 25-jara historio de la Studoj 182 personoj el 36 landoj (4 kontinentoj) komencis siajn studojn en 8 sinsekvaj grupoj, el kiuj kutime la triono finas siajn studojn. ESF kutime ofertas kelkajn stipendiojn. La internaciecon certigas krom la partoprenantoj ankaŭ la instruistoj, specialistoj de sia tereno. La loka stabo konsistas el Ilona Koutny (fondinto kaj gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, Esperanta lingvistiko k.a.), †Zbigniew Galor (E-kulturo, sociologio de la movado), Michael Farris (ĝenerala lingvistiko); el polaj kolegoj Tomasz Chmielik kaj Lidia Ligeża (Esperanta literaturo). El la eksterlandaj kontribuantoj mi mencias nur kelkajn, kiuj regule gvidis kur-



Instruistoj el 2002: Zofia Banett-Fornalowa, Geraldo Mattos, Ilona Koutny kaj John Wells

sojn: Humphrey Tonkin (nuntempaj problemoj de la E-movado), John Wells (fonetiko), Věra Barandovská-Frank (interlingvistiko), Katalin Kováts (E-instruado), István Ertl (E-literaturo), Aleksander Korĵenkov (movado), Nicolau Dols (fonetiko).

Por kelkaj kolegoj la kursoj donis eblecon por verki aŭ elprovi sian libron, ekz. tiel naskiĝis la *Lingvo kaj popolo* de H. Tonkin (2006). Post la multjaraj spertoj venis la tempo por aperigi la materialojn de la studoj: la unua volumo estis *Interlingvistiko* de Věra Barandovská-Frank en 2020, la dua *Esperanta kulturo* redaktita de Ilona Koutny en 2022 (vidu recenzon en tiu ĉi numero de la revuo *Esperanto*) kaj sekvas *Komunikado kaj Esperanto*. Ili ilustras ankaŭ la efikan kunlaboron inter instruistoj kaj studentoj.

Okazis ĉiun trian jaron Interlingvistika Simpozio, sume 5, kiuj estis malfermitaj ankaŭ por ne-esperantistaj kolegoj okupiĝantaj pri internacia kaj interkultura komunikado, pri terenoj proksimaj al interlingvistiko. El la materialoj de la 5-a simpozio (2020) naskiĝis du trilingvaj libroj en la serio de la Etnolingvistika Instituto (*Cross-linguistic and Cross-cultural Studies*). La studoj bone integriĝis en la Lingvistan Instituton, ankaŭ en la instituta lingvistika revuo *JKI* (Lingvo. Komunikado. Informado) aperis regule esperantologiaj artikoloj, kelkaj eĉ Esperante, kaj ĉiuj artikoloj havis Esperantan resumon dank' al la redaktora laboro de I. Koutny, poste ankaŭ de Ida Stria. Post ĝia fermo la tradicio daŭras en la lingvistika revuo *Investigationes Linguisticae*.



Interlingvistika grupo kun Ilona Koutny kaj Katalin Kováts (2019)



Nova atingo en AMU: magistras studoj en Esperanto kaj...

Pro la iniciato de la Universitato en Zaozhuang, Ĉinio, kie ekde 2018 okazas 4-jaraj esperantologiaj bakalaŭraj studoj, ni eklaboris pri la fonda de magistras studoj en AMU en 2021. Por doni allogan kaj utiligeblan diplomon, la esperantologiaj kaj lingvistikaj studoj (inklude lingvopolitikon kaj tipologion) kombiniĝas kun interkulturaj studoj kaj en la angla lingvo, kun uzo de komputiloj en lingvorilataj taskoj.

En la studjaro 2022/23 startis la unuan fojon la 2-jaraj magistras studoj pri interlingvistiko por internacia studentaro enkadre de la studdirekto *Lingvistiko kaj Informmastrumado* (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj). Dank' al la kunlaboro kun Xie Longfei kaj Semio 10 ĉinaj studentoj ekstudis kun granda interesiĝo kaj laboremo.

Ni atendas studentojn el diversaj landoj por la sekva grupo 2023/24.

Ĉu vi volas:

- altnivele (C2) scii Esperanton kaj la anglan?
- akiri sperton en tradukado inter la du lingvoj?
- superi la problemojn en interkultura komunikado?
- studi internacian lingvopolitikon?
- analizi la Esperantan gramatikon kun ĝiaj specifaĵoj en komparo kun aliaj lingvoj?
- koni Esperantajn literaturon, kulturon kaj movadon en monda kunteksto?
- konatiĝi kun konstruitaj lingvoj el la pasinteco kaj nuntempo?
- spertiĝi en la uzo de komputiloj por lingvaj taskoj (fontoj, vortaroj, retejoj, tradukprogramoj ktp.)?
- studi en internacia grupo?
- ekkoni la ĉiutagan vivon en Pollando?



Tiam elektu

la magistras studojn pri interlingvistiko de AMU, en la alloga universitata urbo Poznano (duonvoje inter Berlino kaj Varsovio)!

La surlokaj 2-jaraj studoj valoras 120 kredit-poentojn kaj donas magistran (master) titolon. La lingvistikaj studobjektoj estas en esperanto, tiuj pri informmastrumado en la angla. Anglalingvanoj povos studi alian lingvon anstataŭ la angla.

Informoj: interlin@amu.edu.pl kaj <https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics>

Aliĝo ekde la 1a de junio: <https://mallonge.net/zd>



Enprofundigilo pri niaj kulturaj tradicioj

■ Tim Owen

Esperanta kulturo
 Redaktis Ilona Koutny
 Poznań: Rys 2022
 Formato 24x17 cm
 ISBN 978-83-67287-32-6
 266 paĝoj

En 1998 unuafoje la Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU) en Poznano, Pollando, ofertis internacian postdiplomian studprogramon trijaran. Ĝuste nun, kvaronjarcenton poste, troviĝas meze de la kvara el ses semestroj la studentoj de la oka studgrupo – mi estas unu el tiu grupo rekorde internacia.

Surloke en AMU mi ricevis komence de la dua jaro libron tute freŝe eldonitan, la duan en la serio *Interlingvistikaj Studoj*. Ĝian antaŭirinton, *Interlingvistiko: Enkonduko en la sciencan pri planlingvoj*, verkita de Věra Barandovská-Frank, mi jam voris, ricevinte ĝin la antaŭan jaron por utiligado kiel klerigilon por du semestroj de la studobjekto *Interlingvistiko*. Malofte lernolibron mi atakis kun tiom da energio, kaj tiel mi antaŭguis trafolumi la sekvaĵon, ĉi-foje ne verkegon de unusola fakulo, sed kolekton de 14 ĉapitroj verkita de 13 aŭtoroj el dek landoj, redaktita de Ilona Koutny, la ĉefa motoro de la postdiplomaj studoj.

Ĝi sukcese trapasis la unuan teston: estis tuj evidente, ke temas pri serio, ĉar la kovrilon de la libro B5-formatan oni fasonis tute same kiel antaŭe: temas pri unukolora fono sur kiu troviĝas tutlarĝa rombo, kaj la antaŭan kolorparon krema-sur-bluan oni anstataŭigis per verda-sur-oranĝa. La suban duonon de la paĝo okupas vitro-artaĵo verkita de Katalin Kováts: belelega pavo, la imponan plumaranĝon dissternanta.

Ilona Koutny per antaŭparolo kaj ĉapitro *Enkonduko al Esperanta kulturo* pretigas la tablon, kaj prezentas la unuan neatenditaĵon: kolorajn bildojn! La



ĉapitro, kiel ĉiu alia, finiĝas per aro da demandoj kaj diskut-temoj, ebligante pli aktivan digeston de la prezentaĵoj ol pasiva legado. Sekvas la aliaj dek kvar ĉapitroj, sub du supraĵaj kategorioj.

Kolektiĝas sub la unua titolo, *Kulturo – lingvo – komunumo*, ses artikoloj verkita de Fabio Fortes, Ilona Koutny, Sabine Fiedler, Aleksandro Melnikov (dufoje) kaj Ida Stria. Tiu seso ne estas la plej facile legeblaj tekstoj, almenaŭ por tiuj, kiuj ne jam al kutimiĝis al universitataj esplor-artikoloj, sed persisto povas doni frukton. Aparte alirebla por ni laikoj estas *La frazeologio de Esperanto kiel spegulo de kulturo* de Sabine Fiedler, kiu prezentas fiksitajn esprimojn kutime reproduktatajn el la memoro: ĉiutagaĵojn en ĉiu etnolingvo, kaj montritajn ekzistantajn ankaŭ en Esperanto, ĉu per parolturnoj, proverboj aŭ formuloj. Kiel ŝi klarigas, kutime sufiĉas mencio de komenca parto por ke alia homo tuj kompletigu la frazeologiaĵon: *Ne ŝovu la nazon ...* Espereble ne necesas *rompi al si la kapon* (jen dua ekzemplo) por fini la frazon. Leĝera komenco kondukas al pli profunda prezentado, sen tio, ke la artikolo iel ajn fariĝas peza.

En la dua kategorio, *Diversaj terenoj de la esperanta kulturo*, troviĝas la

veraj perloj, artikoloj facile legeblaj kaj informriĉaj pri apartaj temoj plene interesaj al ni ĉiuj. François Lo Jacomo – ne nur Akademiano kaj mia kunstudento en Poznano, sed ankaŭ aktoro esperantista – prezentas trarigardon de la Esperanta teatro, ekde la unua teatraĵo: ne, kiel mi “sciis”, la prezento de *Kontraŭvola edziĝo* de Molière en la bulonja kongreso, sed traduko de Tolstoj-aĵo en 1896. Akompanas tion tre simila artikolo pri Esperanta kino verkita de Judit Schiller. Same leginda estas kontribuo de Jukka Pietiläinen pri la historio de la Esperanta gazetaro: ĉu imageble, ke aperis pli ol 10 000 periodaĵoj en Esperantujo, pli ol 37 000 jarkolektoj? Ne dubinde, do, ke kulturan heredaĵon havas Esperanto, kiel li bele montras.

Okaze de ĝia centjariĝo Barbara Pietrzak, en sia eseoj *Esperanto-Radio*, skizas tre alloge la historion de la komunikilo kaj ĝian rapidan progreson: en 1922, la unua jaro, du radiostacioj aplikis Esperanton; tio fariĝis 130 el 18 landoj en 1924, kaj 149 el 33 en 1928. Similan fenomenon el la lasta tempo prezentas Miĥaelo Rikardo Balicki (samkursano): la provojn krei Esperantan televidilon. Jen martel-frapeto por mi, ĉar mi estis aktiva esperantisto dum tiu epoko, tamen apenaŭ memoras kelkajn jam adiaŭintajn projektojn, kaj ĝis la legado neniam aŭdis pri pluraj! La tiama nuno rapide fariĝis historio, sen tio, ke mi eĉ multon sciis pri ĝi en la momento. Feliĉe tio ĉi ne plu estas problemo, ĉar la verkintoj tre kapable kompilis la historion de nia divers-terena kultura agado. Akompanis ilin en tiu dua kategorio artikoloj verkita de Svorad Zavorský, Li Xin kaj José Antonio Vergara.

Ne ĉio kompreneble povas esti senriproĉa. Ĝenetis la legadon manpleno da tajperaroj (“havas FB-paĝxon” – p26; “kvankam ne ĉam tiom riĉa kiel en naciaj kulturoj” – p28; “diplimiĝis en Anhuia Esperanto-Kolegio en 1987” – p249), kaj de tempo al tempo mi estus preferinta alian vortformon: laŭ mi-

aj sento kaj gusto "... William Auld, verkisto de la *Infana raso*, proponata eĉ por Nobel-premio ..." (p23) estu "... verkinto de *La infana raso*, proponita eĉ ..."

La redaktado certe estis leĝera, eb- ligante, ke ĉiu konservu sian voĉon: ekzemple, i-istoj ne fariĝis uj-istoj, kaj inverse, nome de unuecigo. De tempo al tempo, tamen, ja necesas fari ŝanĝojn por krei unuecan tutajon, plej evidente ĉe la videblaj stil-elektoj. Pri citiloj, ekzemple, regas ĥaoso: mi rimarkis: 'tiajn', «tiajn», „tiajn“, „tiajn“, "tiajn", kaj plej ofte "tiajn". Kelkfoje ene de la sama artikolo la maniero ne restas konsekvenca; plej ĝene, tamen, estas la pluraj kazoj, kiam la stilo ŝanĝiĝas inter la komenco kaj fino de frazo! Tiajn nepre kaptu provleganto aŭ redaktoro.

Ne mondske grava, tamen iom ĝena estas tio, ke ĉiu ĉapitro, komen- ciĝante en dekstra paĝo, ne mencias la aŭtor-nomon. Por ekscii pri tio, ne-

cesas turni la paĝon por vidi tion paĝ- supre en la maldekstra paĝo.

Mi alte rekomendas tiun ĉi ese- aron al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la kul- turaj fenomenoj de nia lingvo. Ne eb- las, ke ĉiuj jam scias ĉion pri la Espe- rantaj teatro, kino, radio, gazetaro kaj televido, kaj la rilataj artikoloj estas facile legeblaj kaj riĉaj je informoj. Mi persone ne multe interesiĝas pri la pli efemeraj eventuale teoriaj artikoloj, sed la belo troviĝas en tio, ke en referenc- verko oni ne estas devigata legi ĉiun vorton. Mi ne havas timon aserti, ke la elstaraj historiaj artikoloj, kiuj ebligas kleriĝi pri la longe okazinta agado de niaj pioniroj, estas la valoraĵoj de tiu ĉi libro, senpage elŝutebla ĉe *mallonge.net/yz*. Vere indas legi la libron por po- vi rapide akiri profundajn sciojn pri tiuj temoj en malmulte da tempo.

Enorman gratulon meritas Ilona Koutny multflanke, ĉi-okaze pro tio, ke la libro ekestis el kontribuoj de pre- legantoj kaj nunaj studentoj de la Inter-



Tim Owen

lingvistikaj Studoj en Poznano. Ili kreis bonegan lernolibron por ni, partopre- nantoj en la oka studgrupo kaj por la studentoj de la nove lanĉitaj du-jaraj magistras studoj en Poznano, kaj al- ireblan superrigardon por la esperan- tistaro ĝenerale. Mi antaŭguas legi la preparatan trian en la serio, pri komu- nikado, aperigotan en septembro.

Historio

Rogov

(El "Forgesitaj nomoj")

■ Mikaelo Bronŝtejn

Dum la unua duono de mia lon- ga vivo la sorto donacis al mi ŝancon renkonti personojn (onidire la vorto "samideano" iĝis malmoda, eĉ danĝe- reta, ĉar ĝi aludas certan sektecon de nia movado), kiuj, ellerninte Esperan- ton antaŭ la Dua mondmilito, supervi- vis kaj la teruraĵojn de la Granda Purigo en Sovetio kaj la hororon de la militaj jaroj. Estis ili, la supervivintoj, kiuj en la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento kuraĝis lanĉi rekreon de la Esperanto- movado en la lando, ankoraŭ ne plene liberiginta de la antaŭa timo. Plej ver- ŝajne, mi estis la unua al kiu ili konfi- dis siajn vivhistoriojn – seniluziajn kaj fascinajn.

Mi estis juna, facilanima, distriĝe- ma. Mi pigris skribi. Aparatoj por reg-

istri voĉon estis tiuepoke neakireblaj en mia medio. Multo tamen fiksiĝis en mia memoro kaj, eble, mi ankoraŭ ha- vos tempon por prezenti tiujn homojn – verajn kavalirojn de la verda stelo – al la esperantistaro. Ili estas parto de nia

historio, kaj, miaopinie, parto, kiun ne indas forgesi.

Nun mi komencu de la persono, kies apero en mia vivo difinis mian vo- jon. Kaj ne nur mian. Mi rakontu pri mia Instruisto. Pli ol iu ajn alia li meri-



tas tion nun, ĉar la 5-an de majo 2023 venas lia 110-jariĝo.

Profunda ukraina provinco, vilaĝo Ĉornij Ostriv (Nigra insulo) en Podolio estas la loko, kie en 1913, en la rusa familio Rogov naskiĝis knabo, Andreo. Ne multon mi scias pri lia familio. Ŝajne, la gepatroj estis instruistoj de elementa lernejo. Du fratojn li havis, iliaj spuroj perdiĝis en la tempoiro.

Kun elstaraj kapabloj por lingvo-lernado, la vilaĝa knabo Andreo senprobleme studentiĝis en la lingva fakultato de la ŝtata universitato en Kievo. Tie li akiris bonegan posedon de la germana kaj la instruistan diplomon, por oficiĝi kiel instruisto en la vilaĝo Ivankivci. Sed antaŭ la studentiĝo, ankoraŭ knabaĝe li alproprigis Esperanton per la lecionoj, aperintaj en la sovetia porinfana ĵurnalo "Pionerskaja pravda".

Andreo Rogov evitis la persekutadon de esperantistoj, kiu ekstermis la movadon en Sovetio. Tiutempe, en la jaroj de la fifama "Granda Purigo" li militservis kaj ne aktivis kiel esperantisto. La jaro 1941 kaptis lin kiel leŭtenanton kun la posteno de milita tradukisto. Kiel tia li kun esplorista skipo dum la tuta milito moviĝis antaŭ la frontlinio, kaptante malamikajn oficiojn por enketado. La gloragoj de la brava tradukisto estis honorigitaj per multaj ordenoj kaj medaloj; por li la milito finiĝis en Vieno, kie li dum kelkaj jaroj oficis kiel tradukisto de la sovetia militataŝeo.

La sorto favoris lin. Nur dufoje kaj ne tre grave vundita dum la militaj jaroj, Rogov revenis en la vilaĝon Ivankivci kaj trovis la edzinon kun du filinoj vivaj, malgraŭ ke antaŭe atingis lin informoj pri perejo de la familio. Li iĝis direktoro de la vilaĝa lernejo, kaj post la eko de la Ĥruŝĉova "degelo" li komencis instrui Esperanton en la Palaco de Junpioniroj en la apuda urbo Ĥmelnickij. Ankaŭ mi en 1961 venis al lia Klubo de internacia amikeco por ligi mian tutan vivon kun la movado, do mi opinias lin mia spirita patro.

La klubo de internacia amikeco devis pravigi sian nomon, do krom instruado la klubanoj vikle korespondis



kun diverslandaj esperantistoj. Leteroj, bildkartoj, afiŝoj ktp. estis uzataj por publikaj ekspozicioj, la t.n. "Sonlete-rojn", ricevatajn el multaj landoj, eĉ el Novzelando, volonte prenis por siaj programoj la loka radio, la urbaj filatelistoj ĉasis eblecon akiri raraĵojn per korespondado en Esperanto.

Iom poste, ricevinte permeson de la urbestro, Rogov lanĉis Esperanto-kursojn en la urba Kulturdomo. Sed instruado kaj kluba agado ja ne estis liaj nuraj iniciatoj. La oldega tajpilo, akiritita en brokantejo – kun latinaj literoj, kio estis vera raraĵo – laboris senhalte. Uzante fajnajn foliojn kaj kopi-paperojn Rogov senlace eldonadis kaj dissendadis tra la tuta lando "Ukrainajn E-informojn", "Literaturajn kaje-rojn" kaj aliajn informilojn. La dudek-ekzemplera eldonkvanto estis sufiĉa por ligi inter si la ekĝermantajn Esperanto-klubojn.

Estas fakto ne tiom amuza, kiom konsterna, ke la heroa oficiro, trairinta dum la milito duonon de Eŭropo, poste malgraŭ multaj invitoj kaj pledoj pri partopreno en alilandaj Esperantoarangĝoj neniam ricevis permeson eliri el Sovetio. Sed ununuran atingeblan aranĝon, la Baltajn Esperanto-tagojn (BET), Rogov vizitadis preskaŭ ekde la apero de tiuj. Kunvojaĝis liaj lernantoj, ankaŭ mi, dektrijara.

En 1965, kiam la junularo maturiĝis por fondi SEJM (Sovetian E-Junularan Movadon), multaj pliaĝaj esperantistoj protestis, opiniante tion skismo. Ne Rogov – li senskrupule kaj bonvole subtenis la junajn aktivulojn, eĉ tajpis kaj dissendis la unuan numeron de la informilo "Juna esperan-

tisto". Samkiel alia grava postmilita aktivulo, Simeono Podkaminer, li venadis krom BET al la junularaj tendaroj, organizataj de SEJM – por instrui kaj eduki novan esperantistan generacion.

Dum pli ol du jardekoj li flegis sian plej ambician projekton – "Ukrainan antologion" en Esperanto. Ankoraŭ en 1966 Rogov trovis en diversaj partoj de Ukrainio kaj rekrutis por efektiviĝo de la projekto dek ok Esperantajn verkemulojn. La laboro ekis, kaj en lian teknon venadis tradukitaj verkoj de Taras Ŝevĉenko, Lesja Ukrainka, Ivan Franko kaj aliaj klasikuloj, ankaŭ de gravaj modernaj ukrainaj verkistoj. Ĉion ĉi li po-parte prezentadis en la tajpita "Poeziaj kajeroj". Mi ne havas informojn pri la sorto de la kolektitaj materialoj, sed, ve, – ĝis nun ni, esperantistoj, ne havas "Ukrainan antologion".

La fingroj de du manoj sufiĉas por kalkuli la esperantistojn, ne nur supervivantajn la stalinan teroron kaj la mondmiliton, sed kuraĝajn por lanĉi rekreon de la Esperanto-movado. Andreo Rogov certe estas inter tiuj kuraĝuloj.

Pro negrava sed fuŝe farita operacio li forpasis en aŭtuno 1978, atinginte nur 64-jaran aĝon. En 2016 mi sukcesis lastfoje veni en mian naskiĝurbon Ĥmelnickij; mi veturis al la vilaĝa tombejo, kaj metis florkronon al lia tomboŝtono. Sed vojaĝante tra la mondo jen kaj jen mi renkontas liajn disĉiplojn, kiuj daŭre aktivigas por Esperanto – ĉu ne ili estas la plej valora krono por lia sindona laboro en Esperantujo?!

Kvar grandaj strategiaj temoj – niaj defioj

Preparo por diskutado dum la Universala Kongreso en Torino

■ Duncan Charters,
Prezidanto de UEA

En tiu ĉi artikolo mi celas resumi kaj pliklarigi tri el la kvar grandaj temoj, kiuj ŝajnas al mi kernaj se ni deziras efike plani por la estonteco de nia lingvo kaj de nia Asocio. Se konsentos la Komitato, tiuj povos formi la bazon de la forumaj diskutoj dum la UK, aŭ alternative ili integriĝu en la kutiman strukturon.

1. Kapablo kunlabori – esenca kondiĉo por progreso

Kiel prezidanto de UEA, mi eble pli ol multaj aliaj konscias kiam ekzistas konfliktoj kaj kolizioj en agado kaj opinioj de individuaj aktivuloj por Esperanto. Tio ne signifas ke ni ne bonvenigu maksimumon de diverseco de ideoj kaj aliroj inter niaj membroj kaj ekster la Asocio. Tamen gravas nia reago al esprimiĝo de malsamaj ideoj, en individuaj, lokaj aŭ transnaciaj konsversacioj.

Mi jam ofte rakontis pri la internacie respektata ĵurnalisto, preleganto, instruisto kiu lernis Esperanton en la lernejo kaj profitis la sperton. Li rakontis al mi ke kiam li komencis interesiĝi pri la itala kulturo, li trovis ne malfacile lerni la italan lingvon pro la antaŭa sperto pri Esperanto (laŭ la konata lernfaciliga efiko). Li fine decidis enhejmiĝi en Italio kaj instruis tie itallingve. Pro tio ke li agnoskis la valoron de Esperanto por sia vivo, li decidis antaŭ la translokiĝo viziti lokan Esperanto-klubon en sia hejmurbo. Li trovis la sperton tre malagraba pro la evidentaj konfliktoj inter la membroj, ĉar li ne sentis ian fratecan amon inter ili, kaj certe ne kunlaboron por difinitaj celoj ekster la propra rondo. Tion li atendis de praktikantoj de la ideologio de Esperanto, laŭ tio kion li komprenis de sia lerneja instruisto. Li do

decidis ne plu okupiĝi pri Esperanto, kvankam li pretis tion fari se li trovus per tio alian manieron kontribui al siaj idealoj de homfrateco kaj amo inter la popoloj, pri kiuj li efike instruis kaj internacie prelegis. Tiu grupeto de kverelantoj en unu vespero fremdigis al Esperanto individuon, kiu per siaj ĵurnalismaj kapabloj, kontaktoj kaj internacia agado estus povinta multe helpi al nia lingvo, pro dankemo al sia unua sperto kun ĝi.

Mi klarigis al li mian propran sperton. La esperantistoj en la Esperanto-klubo de Croydon estis bonkoraj, helpemaj, respektemaj, interesataj pri mi. Estis diverseco en la membraro, sed neniu al mi evidenta konflikto. La instruisto de la oficiala vespera kurso, al kiu mi aliĝis post ĝia finiĝo propriniciate kaj senpage, venis trajne ĉiusemajne por daŭre instrui al du el ni. Li invitis min al sia hejmo por interparoli kun grava esperantisto el eksterlando. La du gvidantoj de la aparta klubo por junaj esperantistoj estis amemaj, iniciatemaj, kapablaj gvidi gejunulojn laŭ iliaj intereso kaj evidente bone motivitaj. Miaj unuaj spertoj estis nur pozitivaj, kaj tio daŭris en Londono kaj en Kembriĝo kaj en ĉiuj junularaj kunsidoj kie ni amuziĝis senkonflikte. Evidente parto de la kialo ke mi restis aktiva en la Esperantomovado. La realo spegulis la idealojn. Mia rakontado montris al la ĵurnalisto la alian flankon, kiel devus esti la sperto de novaj personoj kiuj trovas nin. Bedaŭrinde tamen tio tute ne sufiĉis por ŝanĝi liajn konkludojn pri la propra sperto, aŭ konsili al mi pri agado en projekto kiun mi priskribis al li atendante apogon kiel interesato pri Esperanto.

Mi vere ĝojas ke ĝenerale kiel prezidanto mi daŭre ĝuas en la Estraro kaj aliloke la formon de kunlaboremo kiu ne malhelpas progreson al niaj celoj.

Malsamaj opinioj, jes, duonofendiĝoj, foje, sed preskaŭ tuj riparataj, vundaj konfliktoj ne. Respekto kaj amo al la motivoj de aliaj, ĉu aŭ ne ili simile pensas kiel ni, gvidu ĉiujn niajn rilatojn interne de la movado.

Tamen evidente ne estas facile tion atingi inter ĉiuj niaj membroj. Kiel mi antaŭe hipotezis, konfliktoj povas naskiĝi pro diversaj kialoj, aparte kiam la movado en iu aspekto ŝajne malprogresas. De tio povas kreiĝi konfliktaj perspektivoj pri la kialoj de la malprogreso aŭ stagnado, kaj akuzoj ke “la aliaj” ĉion fuŝas, nenion pozitivan faras, aŭ ne komprenas kiel ili devus agi. Tamen el tio ni ankaŭ komprenu ke persono, kiu laboris dum jaroj aŭ jardekoj kaj ne vidis rezultojn, povas senti la tenton kulpigi aliajn diverskiale. Kaj tute ekster personaj faktoroj, militado kaj politikaj konfliktoj neeviteble influas opiniojn pri la sinteno al ili kiun havu la movado, kaj specife nia Asocio. Neniu deklaro aŭ sinesprimiĝo, aŭ manko de tia deklaro, povas kontentigi ĉiujn kiam temas pri homaj opinioj.

Mi ne deziras doni eĉ anonime specifajn ekzemplojn de defioj, kiujn ni lastatempe frontis, ĉar ili povas esti identigeblaj. Anstataŭe mi faros pli ĝeneralajn demandojn, kiuj aplikiĝas al ĉiuj:

1. Ĉu en via lando/regiono vi sukcesas allogi gejunulojn, kuraĝigante ilin sed respektante ilian deziron organizi sian vivon ĉefe sendepende de la jamaj landaj agadoj, kaj ne reagi kiam ili esprimas malsamajn opiniojn aŭ nekunlaboremon en “oficialaj” eventoj?

2. Ĉu en via lando/regiono vi havis pli fortan movadon kaj nun spertas internajn konfliktojn, kiuj kaŭzas fremdiĝon aŭ malaperon de antaŭe aktivaj samideanoj, aŭ rezignon pri kolektiva laboro favore al individua?

3. Ĉu en via lando/regiono okazas agado sendependa de la oficiala asocio pro politika kaŭzo en pasinta epoko, aŭ malkonsento kun la prezidanto aŭ estraro, aŭ inter la prezidanto kaj estraro aŭ aliaj agemuloj?

4. Ĉu en via lando/regiono oni ĉe-sigis kunlaboron kun UEA kaj aliaj organizaĵoj pro malkonsento kun iu programo aŭ deklaro de ili?

5. Ĉu en via lando/regiono oni es-primiĝas negative pri individuoj, kiuj kunlaboras kun asocioj agantaj ideologie aŭ politike sendepende de UEA?

6. Ĉu en via lando/regiono vi konas individuojn, kiuj ne plu subtenas al UEA pro malkonsento pri iu aspekto de ĝia agado (vendo de la CO kun ŝanĝoj en administrado, transdono de la arĥivo kaj Biblioteko Hector Holder, elekto de Kongreslando, kunlaborado kun UN/Unesko, neforigo de individuoj aŭ Landaj Asocioj, deklaroj ne pri-konsentitaj, agoj de individuaj respondeculoj)?

Tio tute ne signifas ke UEA mal-
atentu sincerajn kritikojn tute aŭ parte validajn, ĉar de tiuj nia Estraro devas lerni kaj reorientiĝi. Tiun bezonon mi persone plurfoje spertis. Precize pro tio en nova epoko sub novaj kondiĉoj necesas strategia planado por doni voĉon al ĉies spertoj kaj opinioj, cele al la plej prudentaj konkludoj pri la direkto de nia agado. Kaj – posta akceptema kunlaborado, ĉu aŭ ne la konkludoj koincidas kun niaj personaj deziroj kaj perspektivo!

Pri unu alia ne preteratentenda aspekto de konfliktoj kaj konfliktsolva-do mi deziras memori. Esploristoj pri interkultura kompreniĝo konkludis ke ne eblas eviti konfliktojn se la koncer-naj malsamkulturanaj ne estas specife konsciigitaj pri la karakterizaj trajtoj de la propra kulturo kiu influas ilin, kaj la potencialaj kaŭzoj de konfliktoj kun aliaj kulturoj. Por tiuj fakuloj, ne-pre necesas trejnado por mildigi ili-an efikon en ĉiutaga kaj daŭra inter-agado. Tute ne gravas ĉu oni parolas la saman lingvon, kaj ankaŭ ne la ki-aloj ĝin elekti. Abundas konfliktoj inter samlingvanoj. La uzo de alia lingvo, eĉ “neŭtrala” kiel Esperanto, ne aŭtomate ŝanĝas la kulturajn antaŭ-

supozojn de la interagantoj. Oni povas ŝanĝi de la gepatra lingvo al Esperanto sen iu ajn alia modifo en la inter-agado, kaj la konstato de tiu fenome-no povas montriĝi aŭ amuza aŭ konsterna kiam oni ekkonscias pri ĝi. Laŭ stereotipo de britaj koloniistoj, ili ka-pablis lerni la lokajn lingvojn ĝis sufi-ĉa nivelo por sin komprenigi, tamen insistas daŭre paroli ne modifante la fortan anglan akĉenton, kaj neniel mo-difante siajn vivkutimojn en nova kul-turo, ĉar ili sincere kredis ke ilia misio estas tiujn instrui al la lokanoj.

Profesoro kaj simpatianto de Esperanto Alvino Fantini konkludis post jardekoj da studado de interkultura kompreniĝo, ke la kapabloj necesaj por efike interagi kun personoj de aliaj kul-turoj en unu senco ne estas tre malsamaj al ĝeneralaj interpersonaj kapab-loj. Do individuo, kiu jam lernis kiel ha-vi bonajn interpersonajn rilatojn, probab-le sukcesos ankaŭ en interkulturaj ri-latoj. Tamen persono, kiu sen konsciĝo pri la kutimoj kaj sentoj de aliaj uzas kulturajn alirojn, kiuj apartenas nur al la propra etno aŭ nacio, povas tute mis-komprenigi sian intencon interagante kun alikulturanoj. Pri kelkaj kulturaj trajtoj de interpersona komunikado mi aparte konsciĝis en la transiro de An-glio al Usono, inter kiuj landoj ekzistas signifaj diferencoj. Ni nur pensu en nia komunumo ekzemple pri kutimoj de insista aŭ preskaŭ mankanta okulkon-taktado, korpa tuŝado, ridado kaj ri-detado, preskaŭ ne aŭdebla aŭ entuzi-asma, laŭtvoĉa interparolado, inkluzi-
vemaj vortoj, kaj ho ve, gestoj akcep-teblaj en unu kulturo kaj ofendaj en aliaj. Konscie, esperantistoj komprenas ke ili devas toleri, se ne tute akcepti, ke tiaj diferencoj ne malhelpu la komuni-kadon aŭ juĝkriteriojn pri alia indivi-duo. Nekonscie aŭ subkonscie, tamen, povas entrudiĝi intuiciaj antaŭjuĝoj al-propriigitaj ekde la infanaĝo, malfacile identigeblaj aŭ elimineblaj. Kiam mi en profesia kunsido rimarkis ke nia ce-lo en interkultura edukado devus es-ti forigi antaŭjuĝojn, tuj respondis la prezentinto, la sama Alvino Fantini, per riproĉo ke tio estas idealo ne atin-gebla. Ni ĉiuj posedas kaj ĉiam pose-dos niajn antaŭjuĝojn, kiom ajn ni stre-

bos por ilin identigi kaj mildigi, aŭ eĉ egoisme pretendos ke ni sukcesis ilin forlavi.

Ĉu mi identigis la kernon de tio kion ni devas atingi, se ni obeu la avertajn vortojn de d-ro Zamenhof, tiu humila konsilanto kiu ne volis ke oni nomu lin *Majstro*? En sia “cignokanto”, eldirita komence de la 8-a Universala Kongreso en Krakovo en 1912, jubilea festo de 25 jaroj post la apero de la Unua Libro, li kuraĝis aserti:

“Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo bata-lus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.” Kaj “... ke ni, samideanoj, devas reci-proke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tiel nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaron-jarcenton, ni skribas sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan or-donon; tiu vorto estas: “konkordo”.

2. Informado

Ŝajne malmultaj malkonsentus ke unu ĉefa celo de UEA estu informado al la publiko, kiu povas influu kaj kiu inkluzivas gravajn decidajn instancojn de nia hodiaŭa mondo. Tamen unu el la ĉefaj kritikoj, kiujn mi ricevis kiel prezidanto, estas kiom lamas nia in-formado. Eĉ pli, unu el niaj plej aktivaj kunlaborantoj asertis ke UEA en la 40 jaroj de lia persista agado tiukampe neniam prenis tiun taskon serioze. Ĉu aŭ ne ni samopinias, malmultaj malkon-sentus ke restas multo ankoraŭ farebla kaj farenda en tiu kampo. En mia espe-rantista vivo, mi plurfoje intervjuiĝis pri Esperanto por amaskomunikiloj, ĉe-fe por radio en hispanlingvaj landoj kaj Usono. Tamen dum pluraj jaroj de mia prezidado de UEA, nur en Kanado aranĝiĝis du televidaj intervjuoj. Kompreneble intervenis neordinaraj cir-konstancoj, sed mi konscias ankaŭ mi-an propran respondecon tiurilate. Ĉefe gravas ke mankas la necesa strukturo por komunikiĝi regule kun la ekstera mondo. Ni ne utiligas servon kiu tuj

sendas al ni ĉiun mención pri Esperanto en la mondaj amaskomunikiloj, kaj kiam publikiĝas artikolo, ĉu favora aŭ malfavora, ni ne estas pretaj tuj reagi. Povas hazarde respondi individuoj, pli aŭ malpli bone sed sen gvidlinioj. Ĉu ni restu kontentaj pri tiu aferstato?

Mi prenu interesan ekzemplon tute aktualan. Kolego mia atentigis pri artikolo plurfoje mencianta Esperanton, verkita de Profesoro Justin E.H. Smith, konata filozofo de la Universitato de Parizo, kiu havas fortan intereson pri lingvoj kiel parto de sia kariero kaj vivperspektivo. Por kiuj legas la anglan, "Speaking of tongues" aperis en Usono en la ĉi-jara maja numero de *The Sun Magazine*: <https://mallonge.net/zf>

Unue, necesas substreki ke estis nur hazardo ke emerita kolego mia kiu vaste legas vidis ĝin: respektata gazeto tamen nur reta kaj ne ĝenerale konata. Tamen ĝi enhavas gravajn artikolojn de konataj fakuloj. Due, mi mem devis diskonigi ĝin al lingvistoj kaj aktivuloj en niaj rangoj. Tuj leviĝis la demando, "Kiu respondu ĝin?" kaj kiel. Ni ne estis preparitaj. Trie, kiel respondi? Ofte iuj esperantistoj, vidinte tian artikolon, respondus forte kaj indigne por "korekti" la verkinton (karaj, bonvolu nepre ne fari por ne krei pli fortan malamikon: tion lasu al fakulo kiu scipovas komunikiĝi samnivele kun la aŭtoro – alia principo en tiaj kazoj!). En unu el miaj prezentaĵoj pri tio kiel respondi al kritikoj, mi ŝerce kaj troige indikis precize la malĝustan vojon respondi al demando "Ĉu Esperanto neeviteble disdialektiĝos?":

"Ĉu vi pridubas mian inteligenton? Esperanton oni kreis por FORIGI problemojn de lingva kaj dialekta miskomunikado, ne por plifortigi ilin! Tio estus tute kontraŭ la esenco kaj la spirito de Esperanto mem, do estas vera insulto kredi aŭ kredigi al aliaj ke la perfekta ilo por pace kunigi la homojn kaj forigi lingvajn diferencojn povus mem suferi de la fiaĉaj difektoj de ĉiuj aliaj lingvoj! Kondamninde – vi atentu kion vi skribos estontece!". Ne necesas detali ĉiujn problemojn pri tia respondo, sed kreu min, momenta emocio povas misinflui eĉ normale kleran respondanton. Por ne lasi nur ti-

un respondon por via konsterno aŭ amuziĝo, mi aldonu iom pli prudentan. Notu la unuan frazon, "Fakte vi pravas...", kiu gratulas la verkinton pro inteligenta komento kaj demando antaŭ ol aldoni informojn pri kiuj la aŭtoro eble ne sciis. Jen baza principo de respondado, danko pro la intereso pri Esperanto, kaj senkritika aldonado de informoj, malfermante la eblon de plia edukado kaj dialogado:

"Fakte vi pravas ke plej multaj esperantistoj certe ne parolas Esperanton sen la influo de la gepatra lingvo. Mi mem prezentis humurajn skeĉojn pri tio en Esperanto-Kongresoj. Tamen laŭ mia persona sperto, la nuna generacio strebas al prononcado kiu ne identigos ilin kun specifa etna lingvo aŭ nacio, kaj parto de la Esperanta kulturo estas montri ĝentilecon al aliaj kaj paroli kiel eble plej 'internacie' aŭ sendialekte por maksimume faciligi interkompreniĝon."

La AMO-seminarioj kompreneble celas trejni la partoprenantojn por pli bone engaĝiĝi kun eksteraj interesatoj, kaj tial mi prezentis en pluraj el ili. Tamen ĉu tia trejnado ne estu konstanta elemento en ĉiuj niaj kongresoj? Ĉu ĉiu konvinkito pri Esperanto ne bezonas povi klare komuniki la kialojn de sia konvinko laŭ la situacio? Mi memoras ke kiam mi intervjuiĝis kun usona ĉefdelegito Bill Harmon en Vaŝingtona radioprogramo, la prezentanto unue celis ataki nin kiel li antaŭe faris kun aliaj gastoj, kiuj reprezentis marĝenajn movadojn. Tamen nia bonhumura komprenemo pri liaj duboj rezultigis subitan konfesion, kiu tute ŝanĝis la etoson: "Nu, efektive, se sidus antaŭ mi, anstataŭ vi du Esperanto-praktikantoj, la fratoj Wright, mi certe primokus ilian aserton ke eblas vojaĝi tra la aero en flugmaŝino!" Post tio, la plej subtenema konversacio kiun oni povas imagi. Ni preparis la vojon kaj respektis la profesiecon de la prezentanto. Li reciprokis.

Konklude do, ni daŭre havas nek la strukturon, nek la trejnadon por profesinivela informado. Ni komencis uzi, foje tre efike, sociajn retojn, sed devas fari multe pli. En Usono ekzistas senpagaj semajnaj gazetoj, kiuj voras ĉi-

ajn interesajn kontribuojn, kaj se ni proponus interesan ĉiumonatan kolumnon pri lingvaj situacioj, kiu foje inkluzivus informajn anekdotojn pri la uzado de Esperanto, miloj da legantoj potenciale tion vidus. Kio estas bezonata? Unu individuo kapabla verki kompetentan, interesan nacilingvan artikolon ĉiumonate pri lingvaj temoj. Plandado kun enketado malkaŝus la vojojn taŭgajn por ĉiu regiono kaj situacio. Ni ekzameni sukcesojn, kaj individuajn iniciatojn kiel la gazetara reklamkampanjo de nia kara kaj dediĉita kunlaboranto Etsuo Miyoshi, por povi ellabori la plej efikan manieron komunikiĝi kun la mondo pri la valoro de nia lingvo.

3. Instruado kaj lernado de Esperanto

Evidente se Esperanto disvastiĝu, necesas ke ĉiam pli da personoj ĝin lernu. Parte sekvo de bona informado, kiu povas nutri la intereson. Esperanto estas jam pro sia reguleco tiel relative facile lernebla, ke ĝiaj avantaĝoj estas ĉiam pli ekspluateblaj. Ni estas jam en la avangardo pri esploro de la kontribuoj de Artefarita Inteljekto tiucele. Vi espereble legis la majan numeron de nia revuo. Esperantisto laboras plentempe por antaŭenigi la lingvajn kapablojn de la versio Bing (Microsoft) de Chat GPT. Nia Novjorka Oficejo ĉe UN ĵus organizis simpozion, en kiu profesiaj interpretistoj kaj tradukistoj reliefigis la avantaĝojn kaj defiojn de nia nova teknologia mondo. La prezentaĵoj inkluzivis la danĝerojn dependi de AI por transdoni signifojn kun la nuancoj, kiuj subkaŝiĝas en publikaj mesaĝoj de politikistoj, kiel nur unu ekzemplo. Kaj nia Kostarika samideano profesoro José Antonio Leoni de León ĵus publikigis kun kolego en la hispana lingvo zorgan esploron pri la avantaĝoj kaj limigoj de AI por la estonteco de edukado kaj lernado.

Resumo: <https://mallonge.net/zg>

La originala hispanlingva artikolo: <https://mallonge.net/zh>

Ni ne konsideru AI kiel la diablon, ĉar ĝi kapablas antaŭenigi pli rapide la lernoprocezojn ankaŭ je nia pro-

fito. Tamen ni komprenu ke AI ne kapblas pensi, kaj ke pensi kaj paroli ne estas samaj kapabloj. AI faris pli necesa la intervenon de kleraj fakuloj, kiuj havas sufiĉan sciaron kaj komprenon pri ĝiaj limigoj. Tiuj esploristoj komprenas ke la homa intelekto funkcias je alia nivelo, pro la kognaj procezoj, kiuj rilatas la percepton de la realo, rezonado, lernado, decidado, kaj natura lingvaĵo kaj lingvouzo. Do AI ne kapblas esti reganto anstataŭ servanto, kaj en

tiu rolo ni povas ĝin ekspluati por pli rapida lernado de nia lingvo. Kiel mi klarigis en antaŭa artikolo, la avantaĝoj de Esperanto por transnaciaj kulturaj interŝanĝoj estas tiel superaj al ĉiuj aliaj solvoj, ke ni pretiĝu por fari konvinkajn demonstrojn de tiu kapablo. Ili nature rezultigos la agnoskon de tiu supereco kaj, se planite, ĝian pli vastan enkondukon por atingi la celojn de paca interkompreniĝo inter la lernoj de la mondo. Idealo atingebla per

konstante diligenta, inteligenta, interligita evolukapabla kunlaboro de UEA kun ILEI.

Pri la kvara “granda temo”, rilatoj kun la ekstera mondo, mi jam sufiĉe multon verkis, sed atendu finan mallongan resumon en la julia-aŭgusta numero. Proksimiĝas la enketilo pri niaj prioritatoj, do bonvolu tion atenti, plenigi kaj resendi post ĝia alveno. Mi elkore dankas pro via kunlaboro ankaŭ por efikigi tiun iniciaton!

Afriko brilas

Esperanto-kurso apud la nacia parko Serengeti

■ Mulele Mbassa

Estas nur 13 km for de Serengeti, la nacia parko de la urbo Bunda, se vi vojaĝas tra la ĉefŝoseo de la urbo Mwanza al la urbo Musoma, kiu situas en mara regiono: ĉi tie vi renkontos nian Esperanto-Centron (Bunda Esperanto-Kulturcentro), kie ni renkontiĝas kaj lernas Esperanton!

La 1-an de majo 2023, kiam la laboristoj en la tuta mondo festas sian laboristan tagon, ni esperantistoj en la urbo Bunda okazigis Esperanto-kurson! La kurso temis pri ekzercado de la lingvo Esperanto kaj kiel lerni kaj uzi komputilon, kiel ilon por faciligi interkomunikadon pere de la teknologioj.

La temoj traktitaj dum la kurso:

1. Lernado por uzado de la esperantigitaj komputiloj. La programo estis sub gvido de s-ro Dismas Robert Kusaya

2. Kiel uzi afiksojn en Esperanto-parolado: gvidanto estis s-ro Mulele Mbassa Makaranga

En la kurso partoprenis 9 personoj kiuj estas esperantistoj loĝantaj en la urbo Bunda! La kurso daŭris 4 horojn kaj estis dividita po du horoj por ĉiu temo!

La kurso komenciĝis je la 10:00 matene. S-ro Dismas Robert Kusaya gvidis la kurson instruante al la lernantoj scipovi startigi la komputilon, koni la programaron, kiu estas instalita en la



komputilo kaj scii kiel uzi ĝin por aliri la retojn. La kurso estis ege interesa kaj altiris la intereson de la lernantoj kaj ĉiuj deziris daŭrigi, sed pro limigo de la tempo la kurso atingis finon je la 6-a.

Post tio sekvis liberbabilado, kiu daŭris preskaŭ duonhoron kaj kursanoj reiris hejmen por manĝi.

Post la manĝo oni devis reveni por eniri la duan kurso-sesion.

Kiel planite je la 03:00 posttagmeze komenciĝis la dua kurso-sesio. S-ro Mulele Mbassa Makaranga instruis al la instruontoj koni la afiksojn (prefiksojn kaj sufiksojn). Unue la lernantoj skribis ilin en sia kajero kaj poste la in-

struisto volonte faris ekzercon al ili kaj kontrolis ilian laboron!

La leciono daŭris 1 horon kaj poste estis duonhoron por ripozo! Kaj kiam estis la 04:30, komenciĝis paroliga leciono kun uzo de la afiksoj en lingva parolo! Tio daŭris unu horon kaj la leciono finiĝis je la 11:30 vespere! Ĉiu estis kontenta kaj ĝuis la Esperantoretoson dum la tago kune kun la esperantistoj en la urbo Bunda per babilado, rakontado ktp.

Ni, esperantistoj en la urbo Bunda, deziras al ĉiuj esperantistoj bonan kunlaboron por la Esperanto-agado en la tuta mondo!

La 39-a Printempa Semajno Internacia 03 – 10 aprilo 2023

■ Liba Gabalda

Post tri-jara paŭzo povis denove okazi ĉeesta aranĝo PSI en la bela Luter-urbo *Wittenberg*, kiu situas en la germana federacia lando Saksio-Anhaltio apud la rivero Elbo. La partoprenantoj loĝis en komforta junulara gastejo proksima al la historia centro de la urbo Vitenbergo. Al la aranĝo aliĝis 113 geesperantistoj el kvin landoj. PSI okazas en la semajno, kiam oni festas Paskon. Partoprenas ĝin multaj familioj kun infanoj, por kiuj estas ĝojige en la dimanĉa pasko-festo serĉi ĉokoladajn ovojn kaj aliajn dolĉaĵojn. Ili ankaŭ havas programon por sin amuzi kaj lerni Esperanton, dum la plenkreskuloj povas sekvi diversajn prelegojn, diskuti pri diversaj temoj. En la programo estis proponitaj diversaj ludoj, joko, ĉigongo, ĵonglado, origamio, ŝtof-kolorigado, ĉina ŝako, konstruado de paperturoj, akrobataĵoj, malstreĉa gimnastiko, zumbao. Eblas lerni Esperanton kun spertaj instruistoj, aĉeti esperantaĵojn en libroservo. La etuloj ŝatas desegni, kolorigi ne nur ovojn, rigardi Mazi-filmon, kunaktori kaj tiamaniere ili lernas Esperanton.

Alloga estis ekspozicio de portretoj kaj libroj de Helga Plötner. Ŝi estas pasia kaj talenta por portreti famajn esperantistojn. La kvin libroj, ĉiu po 16 bildoj kaj interesaj rakontoj, estis eldonitaj pere de la eldonejo *Horizonto* de Jasuo Hori en Japanio. Ŝi donis instrukciojn kiel portreti kaj mem liveris la necesan materialon.

Dum diversaj prelegoj ni povis ekscii pri *Bauhaus*-arkitekturo kaj poste spekti ĝin propraokule dum la tuttaga ekskurso. Dum alia prelego pri biciklado kun BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), ni ekscii pri organizitaj karavanoj, biciklistaj semajnoj

aŭ unutagaj ekskursoj. Aldone ni estis informitaj pri "VeloRElo" – la projekto pri bicikloj en trajnoj. Ĉi-rilate Esperanto bone taŭgas por internacia kunlaboro.

Pri sia sperto dum la trajnvojaĝado al la 107-a UK en Montrealo rakontis André Weber. La prelego pri "Lingva terapio de la lernantoj kun milda intelekta neplenkapablo" informis pri "Centro pri plurlingvismo kaj interkultura komunikado PLURIKO". En alia prelego oni komparis la anglan kaj la Esperantan lingvojn. En ĉi tiu vintra sezono estis bone paroli pri imuneco, vitaminoj, nutrado kaj uzo de sovaĝaj plantoj kiel nutraĵo. Dum tiuj prelegoj ni estis informitaj pri multaj interesajoj. Ankaŭ la klimata krizo kaj la rolo de Esperanto en tiu sfero estis temo de la ĉi-semajna renkontiĝo.

Dum la semajno okazis multaj enurbaj kaj eksterurbaj ekskursoj. La interesatoj povis elekti inter vizitoj de diversaj muzeoj en la urbo mem, grimpi kastelan turon, uzi turisman trajneton, viziti la domon *Luterhaus*, bierfarejon aŭ keksfabrikon kaj ankaŭ sperti noktan promenon tra Vitenbergo. Tre interesa

kaj ŝatata de infanoj estis la bestoĝardeno en la proksimo de nia loĝloko. Ĝi estas la plej malgranda zoologia parko en Germanio, sed tamen havas grandan diversecon de malgrandaj bestoj, ekzemple mamuloj, birdoj, fiŝoj, serpentoj ktp. Eksterurbe eblis viziti la parkon de *Wörlitz*, kiu apartenas al la mondaj heredaĵoj de Unesko, Ferropolison, kiu iam estis brunkarba minejo, muzeon pri la film-industrio *Wolfen*, iaman fabrikon de filmproduktado kun ekspozicio de pli ol 800 fotoaparatoj. Ankaŭ ekskursoj por biciklantoj estis programitaj.

Dum vesperaj programeroj eblis spekti diversajn filmojn, ĝui gitarkoncerton de Feri Floro. Li prezentis latin-amerikajn ritmojn, ĉefe el Kubo, sed ludis ankaŭ siajn proprajn amkantojn. Speciale por infanoj estis dediĉita la pupteatro "Drakofajro" de Christoph Frank. Okazis mezepoka kostumita ballo kaj paska fajro ekstere kun bastonpano kaj kantado. Ne mankis paska nokta diservo. La lasta internacia vespero de la semajno estis dediĉita al artaj kontribuoj de la partoprenantoj mem. Ni spektis infanajn akrobataĵojn, rakontojn, kantojn, ŝercojn, ludojn ktp. La organiza teamo preparis buntan programon kaj meritas grandan dankon pro la laboro, dank' al kiu ni ĝuis agrablajn semajnojn en bona harmonio. Ĉiuj estas invitataj al la venontjara 40-a PSI, kiu okazos en Bavario en la urbo Bayreuth ekde la 25-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 2024.



Vikipedian laboron subtenis Erasmus+

■ Michal Matúšov
(KuboF Hromoslav)

Vikipedio estas grava ne nur por esperantistoj – ankaŭ Eŭropa Unio subtenis ĝin por helpi al siaj civitanoj disvolvi siajn kapablojn. Kvaropo da Esperantaj organizoj danke al ĝia programo Erasmus+ gvidis 3 trejnadojn kaj preparas pliajn edukilojn.

Vikipedio kaj ĝiaj frataj projektoj apartenas al la plej videblaj sukcesoj de la Esperanta komunumo. La Esperanta Vikipedio (ĝenerala enciklopedio) kun siaj preskaŭ 350 000 artikoloj estas pli granda kaj eĉ pli aktiva ol multaj Vikipedioj en etnaj lingvoj. Dum multaj jaroj ĝi helpas plue edukiĝi pri vasta aro da temoj. La Esperanta Vikivojaĝo (turismaj gvidiloj) apartenas al la unuaj Vikivojaĝoj entute kaj jam nun helpas al esperantistoj pli facile, agrable kaj malmultekoste vojaĝi al ekz. Esperantaj renkontiĝoj.

Vikipedio kun siaj frataj retejoj (komune nomataj “Wikimediaj projektoj”) havas komunan econ – ili ĉiuj estas kreataj de volontuloj kiel mi kaj vi. Ili havas nenian ĉefredaktoron, sed la komunumo ilin samtempe verkas kaj kontrolas. Tial pligrandiĝo kaj plikvalitiĝo de Wikimediaj projektoj dependas precipe de disponeblaj tempo kaj kapabloj de iliaj volontuloj. Bonŝance,

kontribuado al Wikimediaj projektoj estas ne nur utila por la Esperanta komunumo, kaj por multaj kontribuantoj estas amuza, sed krome helpas al plua disvolviĝo de teĥnikaj kaj molaj kapabloj. Ekz. kiam mi en universitato verkis bakalaŭran tezon, mi ne bezonis aparte lerni pri citado de fontoj – tion mi jam sciis pro mia laboro en Vikipedio.

Kaj pro tiu disvolvado de kapabloj kaj plua edukiĝo, Wikimediaj projektoj estas interesaj ankaŭ por Eŭropuniaj instancoj. Ja, Eŭropa Unio zorgas pri kapabloj de siaj civitanoj. Tial la organizo Wikimedia EO partnere kun E@I, Esperanto-Kultur-Centro en Tuluzo kaj Bjalistoka Esperanto-Societo, petis kaj sukcese ricevis subvencion de la programo Erasmus+. Kadre de la projekto Vikio por Eŭropo (ViPE) ni organizis 3 ĉeestajn trejnadojn por Wikimediaj novuloj. La temoj de la trejnadaj konstruis unu sur la alia. En Bjalistoko, Pollando, ni traktis la bazojn de redaktado kaj respondecan tradukadon. En Tuluzo, Francio, la trejnatoj lernis pri aŭtoraj rajtoj kaj alŝutado de plurmediaĵoj. Kaj fine, en Nová Dubnica, Slovakio, ni transskribadis libron en Vikifontaro. Ni eĉ sukcesis plene transskribi la libron *Kredu min, Sinjorino!* de Cezaro Rossetti, grandparte pro la heroa nokta laboro de Fejfi! La trejnadaj provizis oportunojn ne nur por

lerni Vikipedion, sed ankaŭ ekkoni samideanojn de aliaj landoj, kaj lokan kulturon. En Bjalistoko nin gastigis la famaj Zamenhofaj tagoj, kaj en Tuluzo SEMEO.

Aldone ni nun preparas novajn manlibron kaj retan videan kurson. Danke al ili, estontaj novuloj ĉe Vikipedio povos orientiĝi kaj spertiĝi pli rapide kaj facile, sen tiom multa helpo de spertaj Vikipedianoj. Danke al tio, Vikipedia kontribuado iĝos pli daŭropova. Kompreneble, altpertuloj daŭre ludos gravan rolon, ĉar la manlibro kaj kurso intence traktas nur bazojn.

Partoprenu

Ĉu ankaŭ vi volas kapabli altkvalite ĝisdatigi la Vikipedian artikolon pri Esperanto en via lingvo, transskribi Esperantan libron en Vikifontaro, aŭ verki turisman gvidilon en Vikivojaĝo por vizitantoj de via renkontiĝo? Venu al la retejo sube por trovi la manlibron kaj videan kurson, kaj aboni novaĵojn!

<https://esperanto.wiki/vipe>

La aŭtoro estas projekta mastrumanto de la projekto. Tiu ĉi projekto estas financata per subteno de la Eŭropa Komisiono. Tiu ĉi publikaĵo respiegulas nur la vidpunkton de la aŭtoro, pro tio la Komisiono ne povas esti respondeca pri ajna uzado de informoj, kiuj aperas ĉi tie.



Trejnado en Bjalistoko estis entuziasma

Bonvenigu Esperanto-libron hejmen

■ Alfons Tur Garcia

Jen la frapfrazo elektita de KEA por inviti al la partopreno en la kataluna tradicia libro-tago, en kiu la asocio partoprenis per du budoj, unu en Barcelono kaj alia en Sabadell.



Eble vi scias ke la 23-an de aprilo oni festas la tagon de Sankta Georgo, tamen en Katalunio tiu tago havas tute specifan celebradon: ĝi estas la tago de libroj kaj rozoj. Tradicie en tiu tago la viroj donacis rozon al la amatino, panjo aŭ iu ajn estimata virino, kiu reciprokas donacante libron... Ŝanĝiĝas tempoj, kaj pluvivas tradicioj kiuj adaptiĝas al la novaj manieroj, tial la 23-an de aprilo en ĉiuj katalunaj urboj kaj vilaĝoj la stratoj svarmas je homoj amase vizitantaj la sennombrajn buntajn budojn, kie oni disvendas ĉiaspecajn librojn kaj rozojn, kiujn ĉu viroj ĉu virinoj aĉetas, reciproke donacas kaj ricevas, konservas por si mem aŭ forĵetas je hejmalveno.

En la lastaj jaroj la pandemio malpermesis la okazigon de tiu librofesto, pasintjare forta pluvego duone malsukcesigis la unuan klopodon de repreno de la tradicio, ĉi-jare tamen virusoj kaj diluvoj jam retiriĝis kaj denove libroj kaj rozoj troviĝis ĉie. Ankaŭ denove la Esperantaj libroj trovis sia(j)n loko(j)n en tiu unutaga folifrenezio, ĉar KEA starigis ne nur unu, sed du budojn, unu en la Rambla en Sabadell kaj alian en la Reĝa placo en Barcelono.

La librotago estas eksterordinara ebleco ne nur por disvendado de libroj kaj revuoj, sed ĉefe kiel aliro al la ekstera publiko, por informi pri Esperanto, diskonigi nian lingvon, instigi la homojn al lernado aŭ reakiro de iamaj konoj jam parte forgesitaj. Ĉiaspecaj homoj demandas, gapas, skeptikas aŭ eĉ eksciigas unuafoje pri Esperanto; estis ĝojige konstatite ke multaj junaj homoj, eĉ infanoj, alproksimiĝis al niaj budoj kun intereso pri Esperanto. La afero tiel sukcesis ke la novaj flugfoli-



oj, glumarkoj, libromarkiloj preparitaj por la okazo kaj malavare disdonitaj, tute elĉerpiĝis tiel ke ni eĉ devis preni el tirkestoj tiujn de aliaj jaroj.

La 23-a de aprilo estas aparte eksterordinara libro-tago, sed por ebligi ke en iu ajn tago de la jaro oni povu akiri Esperantajn librojn, KEA funkciigis tute novan kaj aktualan retbutikon, kiu estis inaŭgurita okaze de la tago de Sankta Georgo kaj kiun oni povas aliri en la jena ligilo <https://butiko.esperanto.cat/>.

Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



DUMVIVAJ MEMBROJ
Hispanio: J.D. Díaz Bautista.

SOCIETO ZAMENHOF
Belgio: K. Lödör, K. Tytgat.

ALIANCO 365
Francio: R. Triolle.

PATRONOJ de TEJO
Hispanio: S. Adebowlale.
Kanado: F. Meijer.

DONACOJ
ĝis la 5-a de majo 2023

Amsterdama Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto
Nederlando: Esperanto Nederland 250,00.
Sumo ĉi-jara: 2100,00.

Fondaĵo Afriko
Hispanio: R. Urueña de Hernández 100,00.
Sumo ĉi-jara: 5386,23.

Fondaĵo Azio
Japanio: Hayashi H. 13,19;
Inumaru F. 19,79; Isino M.,

Kitakawa I., Saitô T., Uehara E. - po 17,15; Syôzi K. 65,95.
Sumo ĉi-jara: 430,63.

Fondaĵo Canuto
Luksemburgo: I. Ertl 20,00.
Nederlando: R. Moerbeek 25,00.
Sumo ĉi-jara: 727,49.

Konto Novjorka Oficejo
Hispanio: R. Urueña de Hernández 300,00.
Sumo ĉi-jara: 300,00.

Ĝenerala Kaso
Alianco 365: 520,00.
Sumo ĉi-jara: 6267,89.

Interparolo kun Petro Chrdle

Petro Chrdle estas ĉeĥa esperantisto, eldonisto kaj verkisto, inĝeniero pri elektrotekniko, doktoro, docento. Li uzas krom la ĉeĥa lingvo ankaŭ la anglan, germanan kaj Esperanton. Tio multe helpas en lia laboro. Elena Popova el Bulgario faris kelkajn demandojn al li.

Elena Popova: *S-ro Chrdle, mi petas, prezentu vin al la legantoj.*

Petro Chrdle: Kiel dirite, mi estis teknikisto: esploristo pri aŭtomatigaj sistemoj ĉe Fervoja esplorinstituto en Prago kaj mi ankaŭ partempe instruis en la Teknika Universitato en Prago kaj en praga filio de la Trafika Universitato en Žilina. Sed jam en la jaro 1991 mi fondis Kongresan kaj klerigan agentejon KAVA-PECH kaj en la jaro 1992 samnoman eldonejon. Komence mi strebis daŭrigi mian parttempan universitatan instruadon, sed tio montriĝis nereala, ĉar la fondita firmao forkonsumis ĉiun mian tempon.

E. P.: *En la jaro 2016 vi eniris la "Ĉeĥan Libron de Rekordoj". Kiel tio okazis?*

P. Ch.: Ne mia persono, sed mia eldonejo estis registrita en la ĉeĥa libro de rekordoj kiel la eldonejo eksportanta propre eldonitajn librojn al plej multe da landoj de la mondo. Tiutempe 63 landoj de ĉiuj loĝataj kontinen-

toj. Estas klare, ke tio estas merite de la libroj en Esperanto.

E. P.: *Mi petas, rakontu kiam kaj kie vi komencis lerni Esperanton?*


P. Ch.: Unuan fojon mi iom konatiĝis kun Esperanto kiel mezlerneĵano, sed mi lernis nur verajn fundamentojn. Poste mi ankoraŭ plurfoje rekomencis lerni ĝin, sed nur kiam mi partoprenis la konferencon *Interkomputo 82* en Budapeŝto kaj vidis, ke ĝi taŭgas ne nur por simpla komunikado, sed ankaŭ por fakaj kaj sciencaj traktadoj, mi plenenergie dediĉis min al ĝi kaj do ekde la jaro 1982 mi mem konsideras min esperantisto.

E. P.: *Mi legis, ke nun vi apartenas al la plej gravaj nuntempaj Esperanto-eldonistoj. Post 30 jaroj, ĉu vi povas diri, al kio vi ŝuldas viajn sukcesojn?*

P. Ch.: Nu, pleje mi ŝuldas al tio pro la fakto, ke Esperantujo estas tro malgranda merkato por grandaj eldonejoj, do eĉ tiu malgranda, kiu eldonis nur centon da libroj en Esperanto, povas aparteni al tiuj gravaj. Sed eble miaj libroj estas ŝatataj ankaŭ pro tio, ke krom elekto de nur enhance bonkvalitaj verkoj mi ankaŭ teknike prilaboras ilin same zorgeme, kiel tiujn por la neesperantista profesia merkato.

E. P.: *Dum 2022 en via lando la Praga Esperanto-klubo festis la 120-jaran jubileon. Kiel esperantisto, eldonisto kaj kiel eksprezidanto, vi havas meriton. Mi legis, ke vi estas honora membro en ĝi. Ĉu vi klarigos ion pri tio?*

P. Ch.: Mi devas vin iom korekti: Jes, la Praga Esperanto-Klubo, en kiu mi membras, festis pasintjare la 120-jariĝon, sed tie mi estas simpla membro kiu plenumis tie eĉ ne la plej malgrandan funkcion. Mi plenumis plurajn funkciojn en la Esperanto-movado, ekzemp-




ple kiel senata sekretario de AIS, komitatano kaj estrarano de UEA, prezidanto kaj vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ktp., sed ne en la praga klubo. Kaj honora membro mi estas (sinsekve) de ĈEA, Esperanto-Klubo en Svitavy (kie mi ĝis nun respondecas pri internaciaj rilatoj de la tiea Esperanto-Muzeo) kaj de UEA.

E. P.: *Mi memoras, ke iam mi balotis por vi iĝi komitatano de UEA. Rakontu pri via agado.*

P. Ch.: Iom mi jam respondis. Ene de UEA mi estis komitatano en la jaroj 1987 ĝis 2012, dum la elektoperiodo 1998 ĝis 2001 ĝia estrarano respondecas pri faka kaj scienca agado. Kaj ekde la jaro 2012 ĝis nun mi plenumas la funkcion de la ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio.

Estus malfacile elekti por rakonti ion el mia poresperanta agado kiel funkcio, posedanto de la kongresa agentejo





P. Ch.: Al la tuta mondo mi deziras, ke la frenezaj egoismaj politikistoj, sendepende en kiu lando ili estas, aŭ ekhavu mankantan saĝecon kaj prudenton, aŭ ili estu iel izolitaj, por ke malaperu la militoj kaj oni povu ĉie en la mondo ĝui pacan vivon. Kaj speciale al la legantoj esperantistoj, mi deziras precipe sanon kaj insiston en la prosperanta kaj peresperanta agado.

E. P.: Dum 2009 Eldonejo KAVA-PECH eldonis mian infanlibron RIM-ENIGMOJ. Mi tutkore dankas al s-ro Chrdle kaj deziras al li sanon kaj novajn sukcesojn!

kaj eldonoj kaj verkisto, do mi nur respondas, ke temas pri kaj seriozaj kaj eĉ lernigaj travivaĵoj, sed ankaŭ pri multaj gajaj. Tiujn lernigajn, do priskribojn, kie mi eraris kaj al kiaj sekvoj tio povas gvidi, mi priskribis en mia verko *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*. La kialo estas, ke mi volas averti miajn posteulojn, por ke ili ne faru la samajn erarojn, kiujn komence de mia agado faris mi. Ĝus mi eldonis mian aŭtobiografiaĵon *Mia vivo kun Esperanto*. Tion mi ne planis. Sed kiam mi verkis la libron *Ĉinio, Koreio, Japanio, landoj similaj sed diferencaj* pri miaj impresoj de tiuj tri landoj, el kiuj mi vizitis Ĉinion trifoje, Koreion sepfoje kaj Japanion dekfoje, mi dume rememoris plurajn travivaĵojn, kiujn mi volonte enmetus, sed tio ne taŭgus, ĉar ili estis ekstertemaj. Do jam verkante tiun libron mi decidis, ke sekvos alia

verko, tiu pli supre menciita. Mi esperas, ke mi povos prezenti tiun mian novaĵon dum la ĉi-jara UK en Torino ene de Aŭtora duonhora.

E. P.: *Se al vi restas libera tempo, kie vi preferas ripozi? Ĉu vi havas ŝatatan hobion?*

P. Ch.: Mia ŝatata libertempa agado estas ekoturismo, do turismo per tiel nomataj "molaj" rimedoj (piedturismo, biciklado, turisma skiado, kanuado). Tio ankaŭ estis la kialo, ke mi organizadis ĉiujarajn ekoturismajn renkontiĝojn por piedturistoj kaj biciklantoj. Sed nun, post mia serioza bicikla akcidento kaj ankaŭ konsiderante mian aĝon de 77 jaroj, mi orientiĝas preskaŭ sole al piedturismo, precipe en ne tro akraj montaroj.

E. P.: *Kion vi deziras al la legantoj?*



**Sekvu kaj abonu
la Gazetarajn
Komunikojn de UEA
por informiĝi pri
freŝaj novaĵoj ĉe:**

**[https://uea.org/
aktuale/komunikoj](https://uea.org/aktuale/komunikoj)**

James Webb malkovris akvosignojn en tereca ekster-planedo, subtenante la studon de Wandel pri la potencialo malkovri vivon en aliaj sunsistemoj

■ Amri Wandel

Komence de majo 2023 esplorteamo ĉe la spactele-skopo James Webb raportis pri malkovro de signoj de akvo-vaporo en la atmosfero de la rokeca ekster-planedo GJ 486 b, kiu estas nur 1,4-oble pli granda ol la Tero (<https://mallonge.net/z4>). Kvankam similaj malkovroj okazis antaŭe (unuafoje en 2019), tiu ĉi estas aparte signifa por la serĉo de ekstertera vivo, ĉar unuafoje temas pri planedo simila al Tero.



Artista koncepto de la planedo GJ 486 b (el la citita retejo de NASA)

La malkovro de James Webb subtenas novan esploron de Amri Wandel, pri la ebla ekzisto de likva akvo en ekster-planedoj, kiu aperis unu monaton pli frue en la prestiĝa scienca revuo *Nature Communications* (<https://mallonge.net/>



Afioŝo pri la esploro de Wandel en la reta novaĵbulteno de la universitato de Jerusalemo

z5). La esploro de Wandel estis plurfoje raportita en la israela amasmedio, i.a. en la plej granda novaĵportalo YNET (hebree kaj angle <https://mallonge.net/z6>), en la populara intervjuo programo "3-ŝejod'im" en la kultura kanalo, kaj en

la dulingva novaĵbulteno de la Universitato de Jerusalemo (<https://mallonge.net/z8>).

Pli multaj planedoj verŝajne kapablas subteni vivon, asertas nova studo

(Traduko de parto el la novaĵartikolo en YNET)

Subglaciaj oceanoj en eksterplanedoj orbitantaj ruĝajn nanajn stelojn havas grandan potencialon por vivo, laŭ studo de esploristo de la Universitato de Jerusalemo last-atempe publikigita en la scienca revuo *Nature Communications*. Laŭ nova studo farita de profesoro Amri Wandel de la Racah-Instituto de Fiziko, la daŭra ĉeesto de likva akvo sur planedoj, konsiderata unu el la bazaj postuloj por vivo, estas ĝis 100 fojojn pli ofta en la universo ol antaŭe taksita. La studo trovis ke oceanoj sub glaciaj tavoloj sur planedoj orbitantaj ruĝajn nanajn stelojn, la plej abunda speco de steloj, estas promesplenaj celoj por serĉi vivon.

Eksterplanedoj orbitantaj ruĝajn nаноjn estas pli facile detektablaj kaj iliaj surfacoj estas pli facile studeblaj ol planedoj orbitantaj stelojn similajn al nia suno.

"La esploro implicas signife pli altan verŝajnecon malkovri planedojn kun potencialo por vivo, precipe ĉirkaŭ plej oftaj ruĝaj nanaj stelsistemoj," diris Wandel.

"Krome la ebla ekzisto de likva akvo sub glaciaj tavoloj sur ĉi tiuj planedoj vastigas la vivo-taŭgan zonon [angle: Habitable Zone] de ĉiuj steloj, inkluzive de ne nur ruĝaj nаноj," li aldonis.

"La probableco trovi planedojn kun kondiĉoj taŭgaj por la disvolviĝo de vivo, inkluzive de likva akvo, estas laŭ la nova studo ĝis 100 fojojn pli granda ol antaŭe taksita," li diris.

Ankaŭ en la Germana Kongreso, Torino kaj en la IKU-libro

La nova esploro aperas en broŝuro eldonita por la AIS-kurso "Novaj esploroj pri la Serĉo de Ekstertera Vivo: Eksterplanedoj, NIFOJ kaj SETI" okazanta dum la jubilea Germana E-Kongreso fine de majo. Samnoma prelego okazos kadre de la Internacia Kongresa Universitato en Torino. La tekstoj de ĉiuj prelegoj de IKU kaj Scienca Kafejo aperos en la IKU-libro. Tiu tradicia kolekto de prelego-tekstoj estas jam redaktata kaj aperos kiel en la lastaj 4 jaroj ĉe eldonejo Impeto. Papera versio





estos aĉetebla en la kongresa Libroservo kaj, kiel en la lastaj tri jaroj, estos havebla ankaŭ reta versio.

Pretas jam provizora skemo de la scienca programo en Torino (enkadre). Kiel kutime, tri el la IKU-prelegoj estos ankaŭ kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj. El tiuj kursoj kaj la IKU-prelegoj de Goodall kaj Wandel konsistos la 39-a Scienca Universitata Sesio de AIS.

IKU kaj Scienca Kafejo en Torino:

Dimanĉe (14:30-16): IKU-inaŭguro+IKU/AIS1-1 (Jacobsen), (16-17) IKU/AIS2-1 (Goes)

Lunde (posttagmeze): IKU/AIS3-1 (Labrie), IKU4 (Wandel)

Marde: (matene) Scienca Kafejo sesio 1 (1-5 Baláž, Lindstedt, Raola, Tarrachini, Tuidler), sekve IKU5 (Tonkin), IKU6 (Barandovská-Frank)

Ĵaŭde: (matene) Scienca Kafejo sesio 2 (6-10 Butan, Dawson, Eckert, Fontaine, Lo Jacomo), poste IKU7 (Goodall), IKU/AIS1-2, IKU/AIS2-2, IKU/AIS3-2

Vendrede: IKU8 (So), IKU9 (Pennacchiotti), Scienca Forumo.

Kvarlingvaj resumoj kaj ekstera informado

La resumoj de ĉiuj 19 prelegoj aperos en la IKU-libro 4-lingve (Esperanto, angle, france kaj itale), kiel videblas jam nun en la IKU-paĝo <https://uea.org/teko/IKU>. Pluraj prelegantoj mem tradukis siajn resumojn, la ceterajn tradukis en la anglan Edmund Grimley-Evans, en la francan Yannick Dumoulin, en la italan Renato Corsetti, Carlo Minnaja, Ermanno Taracchini kaj Giancarlo Fighiera. Kunordigis Amri Wandel, enretigis Andrej Grigorjevskij. Al ĉiuj prelegan-

toj la IKU-sekretario proponis informi pri la IKU-libro en institucioj kiel bibliotekoj kaj universitatoj, kiuj eventuale mendu la IKU-libron por siaj sciencaj aŭ lingvaj kolektoj. Efektive, helpe de la IKU-paĝo kaj aparte de la multlingvaj resumoj, ĉiu iniciatema s-ano povas jam nun reklami ĉe instancoj ekster Esperantujo la IKU-libron, kiu jam pli ol 25 jarojn efektivas la sciancan agadon kaj eldonadon en Esperanto.



Al nia stoko de brokantaĵoj konstante aldoniĝas novaj (malnovaj) varoj. Vi trovas ilin en la sekcio por brokantaĵoj en katalogo.uea.org.

Neniu anglalingva bahaano kontestas la esperantistecon de Baha'u'llah evidentigita en dulingva eseo: <https://www.bandeducation.com/hypocrisy-in-religion>

EBLE ĈAR NENIU EL TIUJ ĈI ANGLALINGVAJ ESTROJ ESPERANTISTIĜIS



ILI ĈIUJ SKRIB-SOLENE IAM PROMESIS OBEI AL ABDUL BAHÁ


Membroj de la Universala Domo de Justeco elektita en Hajfo, la unuan de majo 2023, Chuungu Malitonga, Paul Lample, Juan Francisco Mora, Ayman Rouhani, Payman Mohajer, Shahriar Razavi, Praveen Mallik, Andrej Donoval kaj Albert Nshisu Nsungu.

INTERAKTIVA LIGILO:

<https://bahaiforums.com/t/consultation-and-obedience-part-125623>

Italaj verkoj en la Serio "Oriento-Okcidento" de UEA

Aperis ĝis nun en la Serio "Oriento-Okcidento" de UEA tri verkoj el la itala literaturo el kiuj ankoraŭ acetebblas ĉe la libroservo de UEA la jenaj du: *La gefianĉoj* de Alessandro Manzoni, tradukita de Battista Cadei. Milano: FEI, 2006, 495p. € 29,70 kaj *La princo* de Niccolò Machiavelli, tradukita de Carlo Minnaja. Milano: FEI, 2006, 103p. € 11,10. Elĉerpita estas *La Dia Komedio* de Dante Alighieri, tradukita de Giovanni Peterlongo.



EVENTA SERVO

Diskonigu Esperanto-eventojn tutmonde

Eventa Servo estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.